

POEMTRADUKOJ

de Cezar & klubo Karapaco



Volumo 01

RIMPOEMAJ TRADUKOJ

Anonimuloj

Breĥt, Bertolt

Charms

Goeto, Johano de Lupiro

Grifio, Andreo

Heine, Henriko

Hodjak, Franc

Matenstelo, Kristiano

Michler, Eli

Mörike, Eduardo

Niemöller

Ringelnac, Joakimo

Rilke, Rajner Maria

Rumi (Maulana Dschelaleddin)

Ŝilero, Frederiko

Weerth, Georgo

ANONIMULOJ

Kristnaska ansero

La kanto pri la morta infano, kiu volis varmigi sin

Morne estis, helis luno

Ni volas migri

Kristnaska ansero

Paŝas sur Ter'
ansero kun trankvilo,
mendita jam, surlista er'
por la flugiltondilo.

Vostumas ĝi eĉ kun fier'
kvazaŭ en viv' sen fino.
Sen timo estas la anser'
pri la titoldestino.

La dommastrin' kun nova pat'
nur pensas: Restu brava!
Rostaĵ' vi estos, gusta flat',
kun bruna krusto rava.

Kristnask-anser'
paŝas sur Ter'
kaj fekas post la domo,
kvankam ĝi estas listmender'
por buloj kaj legomo...

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ la anonima teksto sur kristnaska paĝo en la regiona gazeto

„Ostthüringer Volkszeitung“ (OVZ)

La kanto pri la morta infano, kiu volis varmigi sin

Infanoj en Aŭŝvicio

(Aŭŝvicio-infankanto)

Flugis infan' en Birkenau
tra kamentub' ĉe la fin'.
Tio devis nun en vintro en vent'
en frida frost' movi sin.

La infanet' ne estis sola.
Kunflugis en cindrofum'
multaj pluaj post mort' apud ĝi,
eĉ novnaskitoj, sen lum'.

Frostvent' blovis al ĉiuj, ho ve.
La infaneto tremis tre,
kvankam ĝi brulis en la forn'
en ardo kaj ĝis cindroform'.

Nun serĉas la frostrema infanet'
lokon kun varmo kaj kviet'.
Ĝi frapas ĉe domo je la pord'.
Elvenis jen la murdisto sen vort'.

Li ridas pri l' infan'.
La pordon klakfermas per man':
„Neniam mortis infan' en gas'.
Ve nur, ke ne pli mortis de l' fatras!“

La infan' frapas plu ĉe dom'.
Elvenas bona civita hom'.
Al la morta infan' kapable
li parolis tre varme afable.

Eĉ la gasmortigit' entombu en lit'.
Por burĝo pac' kaj ordo rekomendas.
Forgesi ni devas kaj pri ordo obstinu.
Do, kun bedaŭro funebrojn ni finu.

En frost' la infan' nun frapis plu,
fenestre miris vir' pri la bru',
tuj preĝas, ke la voj' de Di'
ne estas nia tie ĉi.

Ke la nomo Lia kaj la sorto
estu sanktigitaj de l' morto.
Kaj tiam la pia vir' post dir'
plu bone dormis pro l' inspir'.

La infano nun plori komencas.
La ploroj kvazaŭ glacie densas.
Ĝi patrinon vokis kun plend'.
Sed patrino, ŝi mem flugis en plua vent'.

La mortinfan' pro la horor'
lastfoje frapis en ĉi hor'.
Jen venis progresema vir',
fenestre parolis kun elspir':

Mi ja pensas pri vi kun simpati'
kaj pri la faŝisma teori'
mi seminariojn gvidis eĉ mem,

findiskutis pri l' mortinfan-problem',
kaj la temon mi do lastfine forlasis,
pli aktuala de mi
post tio ja ne lasis.

Jen miraklo! En ĉi moment',
la propran infanon jen en la vent'
li ekvidas. Li diris al si, mi volu,
ke miavive ĝi ne plu solu.

Sed nun la ĉiel' en kria flamo
disrompas en fajro en fumodramo.
De l' infanet' ne restis eĉ spur'.

Makul' fenestre do restis nur.
Ĝi flugis tuj for en frida vent'.
Ĉu ĝi estis infanrekrement'?

Flugis infan' en Birkenau
tra kamentub' post la fin'.
Tio devis do en vintro en vent'
en frida frost' movi sin.

La infanet' ne estis sola.
Kunflugis en cindrofum'
multaj pluaj post mort' apud ĝi,
eĉ novnaskitoj, sen lum'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

*laŭ la anonima poemo „Das tote Kind, das sich wärmen
wollte“. La tekston mi trovis en la interreto.(cez)*

Morne estis, helis Luno

germana ŝercpoemo

Morne estis, helis luno,
neĝo verdis sur l' okul',
kiam fulmis aŭt' sub suno
lante preter domangul'.

Ene sidis nur starantoj,
en silent' dum parolad',
kiam post pafmort' leporo
sketis sur la sablopad'.

Kiam nun la aŭt' galopis
retre ĝis la pint' de l' mont',
streĉis korvo, dum ĝi hopis,
turhorloĝon en la front'.

Nur silentis, eĉ ne klako.
Du kameloj jen kun bru'
ludis sur herbejbranĉ-brako
ĝue ŝakon en la fru'.

Du fiŝetoj kure iris,
en la blua kamp' el gren'.
Kiam fine sun' subiris,
ekis griza tagmaten'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ anonima germana ŝercpoemo, kiu troveblas en tre diversaj versioj. Origina teksto fakte ne ekzistas. Mi elektis la version, kiu plaĉas al mi plej bone.

Ni volas migri

Migri volas ni
de urb' al urb' sen fi'.
Man' êe man' tra l' tuta land' .
Ambaŭ migri volas ni.
Ek al la vetoj
pri tri orĉenetoj!
Pri pokal' kun vin'.
Sekvu min!

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ la anonima teksto en malnova vojaĝlibro pri Rumanio

BREĤT

Balado pri la agrabla vivo

Balado pri Mek Tranĉilo

La anakronisma procesio aŭ Freedom kaj democracy

La tajloro de Ulm

Legendo pri al morta soldato

Memoro pri Marinjo A.

Transen de l' montoj

Balado pri la agrabla vivo

(laŭ Francois Villon)

La laŭdoj oftas pri la grandsprituloj
feliĉaj kun libraĉ' kaj eĉ sen pano,
vivantaj kun la ratoj en kabano.
Mi diras: restu for pri tiaj uloj!
Laŭvivu, kiun plaĉas la imag'.
Mi - inter ni – jam satas pri l' admon'.
Neniu birdo eĉ ĝis Babilon'
eltenus tion eĉ dum nura tag'.
Se vivo tristas, helpas ne persvad'.
Agrablan vivon donas nur bonstat'!

La pastro de Saint John, de l' amo filo,
li diras mem, li ankaŭ vinojn amas,
per bela preĝ' Orinjon li ekflamas -
mi kaptas ŝin svingante per hakilo.
Kaj ĉiu prenas sin laŭ sia fort'.
Pri hom' alia pensu sen komfort'.
Sen pago servas ja ne eĉ la art'.
Respekton mian por la vort' laŭ fart':

Nur plejprenanto estas elektat'.
Agrablan vivon donas nur bonstat'!

Aventuristojn kun la brava koro
kaj la avid' je propra fel-ofero
kaj tiuj diroj nur pri l' pura vero,
ke legu do la burĝoj kun adoro,
rigardu ilin iam en vesper',
la fridan damon kun la edz' en lit'
kaj la aŭskulton pro aplaŭd', sen spirit',
la gapojn kvinmiljaren kun desper'.
Ĉu vin ĉe tio kaptas ne kompat'?
Agrablan vivon donas nur bonstat'!

Mi mem, mi havus ja por mi komprenon,
por la prefer' de grand' kaj sol' sen limo.
Sed vido al la uloj el proksimo
avertis min: Nun lasu tian penon.
El povro fontas krom la saĝ' la plend',
el bravo krom la glor' amara ŝvit'.
Vi saĝis, povris jam kun brava spit'.
Nun haltu do pri tiu grandosent'!

Jen tuj sin trovos vojo al beat':
Agrablan vivon donas nur bonstat'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Ballade vom angenehmen Leben“ de Bertolt Brecht

Balado pri Mek Tranĉilo

1

Kaj la ŝarko havas dentojn,
montras ilin sen subtil'.
Sed MacHeath tranĉilon havas,
nevideblas la tranĉil'.

2

Aĥ, ruĝiĝas la naĝiloj
de la ŝark', se fluis sang'.
Mek Tranĉilo portas gantojn,
sen makul' laŭ sia rang'.

3

Ĉe l' Tamiz' kun verda akvo
renversiĝas homa ar',
nek pro pest nek pro ĥolero.
Onidiras: MacHeath-far'!

4

En dimanĉo bela blua
kuŝas strande morta hom'.
Vir' foriras post angulon.
MacHeath estas lia nom'

5

Kaj Ŝmul Majer malaperis
kiel ofte riĉa vir'.
Kaj la monon havas MacHeath.
Ne pruveblas la konspir'.

6

Jenny Towler-n oni trovis
kun tranĉilo en la mam'.
Iras kaje Mek Tranĉilo
sen eĉ scii pri la dam'.

7

La ĉaristo, Alfons Glite,
estas for, sed kial li?
Kiu ajn pri tio sciuz,
Ne MacHeath, jen certu vi.

8

Kaj la granda brul' en Soho:
Sep infanoj, maljunul'-
sen molest', naiva MacHeath en-
amasas post la brul'.

9

La vidvino neplenaĝa,
fama estas ŝia nom',
ŝi vekigis perfortita.
MackHeath, kiom koston hom'?

10

Kaj la fiŝoj malaperis,
ĉagreniĝas la kortum'.
Oni vokas eĉ la ŝarkon,
sed li neas sen cerbum'.

11

Li ne povas rememori
kaj ne eblas kapti lin.
Ĉar la ŝark' ne estas ŝarko,
se ne trovas pruvoj sin.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Ballade über Mackie Messer“ de Bertolt Brecht

La anakronisma procesio aŭ *Freedom* kaj *democracy*

(1947)

En printempgermana land'
el cindro kaj ruina vand'
provis verdi jam betul'
delikate en angul'.

Jen el sudo kaj elvale
venis kote karnavale,
balotara procesi'.
Du tabulojn portis ĝi.

Truaj pro la vermpiknikoj
tre paliĝis la indikoj.
Diveneblis tio ĉi:
Freedom kaj *democracy*.

Sonoriloj nun sen finoj,
La vidvinoj, fianĉinoj,
orfoj, lamaj, kaj tremant' –
gapis mire ĉe la rand'.

Surdan la blindul' demandis,
kio polve preterbandis
kun alvoko tiu ĉi:
Freedom kaj democracy.

Pinte paŝis kalva vir'
tondre kantis kun inspir':
„*Allons, enfants, god save the king*“,
la dolaron *ting ting ting*.“

Poste paŝis kun monstranc'
du kutuloj en avanc'.
Se kuto levis sin pro ŝtup'
sin montriĝis bototub'.

Sur la flaga krucaĵo
nevideblas la svastiko.
Laŭ la iro de l' epok'
nun forestas ĉiu hok'.

Sub la kruco paŝas frato,
de la sankta patro sendato.
Kiu, certe sen kontent'
vidas al la orient'.

Sekvas plu neforgesemaj,
al tranĉiloj longaj emaj,
stamfo krias en la vic'
pri l' liber' de l' linĉjustic'.

Nun ular' kun samaj celoj,
grizaj moŝtoj el karteloj:
Por l' armila industri'.
Freedom kaj democracy.

Kvazaŭ impotenta koko
pavas grandgerman' kun voko
pri l' LIBERO de la vort'.
Legu: murd'.

Takte paŝas instruistoj,
povŝatantoj, cerbfuŝistoj,
volas ŝanĝi plu junulojn
eĉ laŭ rajt' en buĉkunulojn.

Sekvas nun la kuracistoj
malamantaj plu-faŝistoj,
komunistojn do postulas
kaj por testoj enkalkulas.

Sciencistoj, tri sinjoroj,
la gasejaj plandoktoroj
krias nun por la kemi':
Freedom kaj democracy.

Sekvas pro l' neces' de l' ŝtato
ĉiu nazikonvertato,
multaj feltolaŭse sidas,
ĉie altpostene gvidas.

Jen la „*Stürmer*“-redaktoroj
timis jam pri la favoroj,
ne forgesu ni ĉe l' faro
pri l' LIBER' de l' gazetaro.

Kelkaj de la homoj bonaj
judĉasintoj senpardonaj
paŝas post justictumulto
por la rajt' de l' malplimulto.

Parlamenta naziano
hitlertempe sangermano,
advokato, sin proponas,
ĉar engaĝo plu tre bonas!

La marŝanta merkartist',
diras ĉiam kun insist':
Kiel ajnas la tendenc',
por liber' de l' konkurenc'!

Jen juĝisto kun rikan'
kun malnova leg' en man',
imunigis sin de l' pun',
faŝistojn absolvas nun.

La artistoj en amasoj
laŭdojn krias pro kolbasoj.
La bonuloj kun rapid'
servis nur pro bona fid'.

Skurĝoj batas sur la straton,
celas la SS-bonstaton,
ĉar bezonas ja eĉ ĝi:
Freedom kaj democracy!

Kaj la Hitler-virinaro
levas jupojn sen avaro,
brunaj suroj dum parado
por usona ĉokolado.

Inoj fortaj, gazetistoj,
spionuloj, neĝhelpistoj.
Impostinterez-kaptistoj,
Pragermanland-rekasistoj

Sang' kaj kot', amika duo,
marŝis tra la land' kun bruo
ruktis, stinkis, vomis ĝi:
Freedom kaj democracy!

Fine peste tiu hord'
venis al la Isar-bord',
al la ĉefurb' de l' movado,
ekirej' de l' tombfosado.

Informite de l' gazetoj,
ĉe la propraj domskeletoj
staris homoj kun malsat'.
Konsternite pro la stat'.

Kiam la mefita band'
marŝis tra l' ruina land',
paŝis el nazia pord'
ses figuroj nun sen vort'.

La marŝantoj do ekhaltas
La figuroj aŭten saltas,
post kapklin' al la kolon'
ĉe l' tabuloj en la fon'.

Ili en kaleŝoj restas
partianoj ili estas.
Rube levas sin la kri':
Freedom kaj democracy!

Kun la man' ĉe l' vipekstrem'
alveturas la SUBPREM',
kirasite venas ĝi,
jen donac' de l' industri'.

Aplaŭdate en rusta tank',
venas la LEPRO kun dank'.
Pro honto ligas ĝi kun forto
kravatton supren sen vorto.

Nun la TROMPO kun fier'
svingas kruĉon kun bier'.
Ĝi drinkigas vin senkoste,
donu nur la idojn poste.

Olda laŭ Metuŝelaĥ'
en kaleŝ' la STULTO, aĥ,
entreprenas plu kun pomp',
gapas daŭre al la tromp'.

Jen el aŭto brako pendas,
La MURDO mem salutojn sendas.
Brutplezure kantas ĝi
pri *Sweet dreams of liberty*.

Tremante plu post ŝok' sen dorm'
jen la RAB' en uniform',
kiel junkro-feldmarŝal'
kun globuso el metal'.

La ses uloj, kvazaŭ fratoj,
hejmrajtuloj, sen kompatoj,
nun postulas kun pasi'
Freedom kaj democracy.

Sekvas post la plagularo
ege granda mortulĉaro.
Pri l' mortuloj restas dub',
estas nekonata trup'.

Vento kantas elruine
la mortintomeson fine
por la bombtrafitaj homoj,
kiuj loĝis en la domoj.

Fuĝis el kaputaj stratoj
kunmarŝantaj grandaj ratoj,
pepas en la procesi':
Freedom kaj democracy!

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „*Der anachronistische Zug oder Freiheit und Democracy*“
(1947) de Bertolt Brecht

Rimarko: *Stürmer* (Sturmisto) estis gazeto de la nazioj de
1933-1945

La tajloro de Ulm

el la jaro 1592

„Episkop', mi flugos“,
diris tajloro al Moŝt'.
„Venu, por moment'“.“
Kaj li grimpis kun flugiloj
dum aplaŭdo kaj jubiloj,
ĝis la granda granda kirktegment'.

Lia Moŝt' nur diris:
„Mensogoj, kiel ĉiam.
Hom' birdo ne estas.
Homoj flugos neniam.“
La episkopo plu iris.

„La tajloro jam ne vivas“,
diris la homoj ĉe l' Moŝt':
„Trois la aŭdac'.
La flugiloj frakasiĝis,
la tajloro surnaziĝis
sur la dura dura kirkoplac'“.“

Sonoriloj sonis.

„Mensogoj, kiel ĉiam!

Hom' birdo ne estas.

Homoj flugos neniam“,

la episkopo admonis.

tradukis Hans-Georg Kaiser

*laŭ „Ulm 1592“ de Bertolt Brecht, konata ankaŭ kiel „Der
Schneider von Ulm“*

Legendo pri la morta soldato

(1918)

1

Printempo kvara de l' milit'.
Sen espero, ke venos fin',
decidis soldat' sen plia hezit'
heromortigi sin.

2

Sed Ekscelenc' bedaŭris ĝin,
ne pretis jam la milit',
ke la soldat' mortigis sin.
Tro fruis la suicid'.

3

Somero ĵetiĝis sur tomboj nun,
jam dormis la soldat',
jen nokte almarŝis sub la lun'
kuracista komitat'.

4

La militista komision',
aliris ĝis lia tomb',
elfosis la viron kun brua ton'
per ŝpatoj kun pastra pomp'.

5

Doktoro inspektis lin tuj kun skrupul',
kio restis plu, kun sever'.
La doktoro trovis, ke sanas la ul',
ke li fuĝis nur pro la danĝer'.

6

Ili prenis lin do en la bela nokt',
en blua nokt' kun si.
Videblis, sed nur sen kask' surkape,
la steloj de la patri'.

7

Fajrecan brandon ili verŝis en lin,
la korpo putris jam.
Du flegofraŭlinoj alkroĉis sin
kaj duonnuda dam'.

8

Kaj ĉar de l' soldat' eliras fetor',
frontlamas pastro sur l' strat',
Vualas lin per incenc' kun fervor'.
Ne stinku la soldat'.

9

Orkestra muzik', ladblova marŝ',
antaŭas lin kun bru',
kaj la soldat' laŭ sia eduk'
elpaŝas ĝis la genu'.

10

Brakumas kiel fratoj lin
sanitarista par',
por ke li ne ĵetu en koton sin,
ne decas tia far'.

11

Pro la koloroj de la flag'
sur lia mortĉemiz'
portata antaŭ li, la kot'
foriĝis kun sia griz'.

12

Ĉe l' front' eĉ paŝas fraksinjor'
kun brust' ŝvelanta en lum'.
Li, pro la patriota kor',
scias ja pri devplenum'.

13

Kun blovmuzik' do la taĉment'
malhelen marŝis sur l' strat',
kaj kiel flok' en neĝstormvent'
ŝanceliĝis la soldat'.

14

La katoj, hundoj krias: Fi!
Kriĉfajfas la ratoj de l' front':
„Neniam estu francaj ni,
ĉar ĝi estus grava hont'!“

15

Se ili marŝis tra vilaĝ',
la inoj venis ja.
La arboj kliniĝis sub plena lun'
ĉe krioj kaj hura.

16

Kun Ĉindrara kaj ĝisrevid'!
Kun in' kaj hund' kaj Di'!
Ebriiĝinte la morta soldat',
similis al simi'.

17

Se ili marŝis tra vilaĝ',
li ne videblis plu.
Tro multaj saltis ĉe li kun plaĉ'
hurae en la bru'.

18

Tro multaj dancis kaj kriis sen halt',
jam ne vidis lin.
Videbla li estis nur supre el alt'.
Jen montras nur steloj sin.

Ne ĉiam estos stelobril',
alvenos la aŭror'.
Sed la soldat', laŭ sia eduk',
remortos kun fervor'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Legende vom toten Soldaten“ de Bertolt Brecht

Memoro pri Marinjo A.

Sentimentala kanto nr-o 1004

1

En tiu tag' sub blua lun' septembre
ĉe juna pruna arbo en konkord'
mi tenis ŝin, la palsilentan karan,
kaj kiel songon, per brakum' sen vort'.
Kaj super ni somere en ĉielo
mi vidis nubon longe kun fervor'.
Ĝi estis blanka kaj ekstreme alta.
Ĉe l' rerigardo ĝi jam estis for.

2

De tiu tago pasis multaj lunoj,
kaj nuboj ŝvebis multaj en la vent'.
La prunaj arboj eble ne plu staras,
kaj pro l' demand' pri mia amosent'
mi diras nun, mi tute ne memoras,
sed tamen vin komprenas, kun konsent'.

Vizaĝo ŝia tamen tiom foras.
Mi scias nur, mi kisis ŝin kun sent'.

3

Kaj eĉ la kis', ĝi estus forgesita,
se ne estintus tie tiu nub'.
Mi scias ĝin kaj ĉiam ĝin mi scios.
Ĝi ege blankis en la alt', sen dub'.
La prunaj arboj eble eĉ plu floras.
Ĉu sepa id' de l' in' ĵus krias en la fru'?
Sed tiu nuboj floris nur minutojn,
ĉe l' rerigard' ĝi svenis jam en blu'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

*laŭ „Erinnerung an die Marie A.“ Sentimentales Lied Nr. 1004
de Bertolt Brecht*

Kelkaj rimarkoj pri Breĥt, Marinjo kaj tiu ĉi poemo

Marinjo efektive ekzistis, ŝia nomo estas: Marie Rose Aman. Breĥt konatiĝis dekokjara kun ŝi.

Sed Marinjo prefere rakontu mem: „En la frua somero de 1916 oni prezentis Eugen Breĥt al mi en glaciaĵa restoracio. Ekde la unua momento mi estis impresita de la bonega konduto de la gimnaziano, de liaj rondaj belaj okuloj, kiuj sekrete strabis al mi. Sed tion la kunlernantinoj, kiuj sidis kun mi ĉe la tablo, tute ne rimarkis. Kaj efektive li donis al mi ankoraŭ en la sama horo notfolion, sur kiu li faris komplimenton pri mia longa hararo kaj insiste petis min pri rendevuo. Ni vidis nin poste kiel hazarde kelkajn fojojn... Ankaŭ kun miaj gepatroj ekestis malfacilaĵoj...“

Kiam Breĥt kisis ŝin la unuan fojon, ŝi forpuŝis lin, ne sciante, „ĉu kisoj eble eĉ povus havi sekvojn“. Li diris: „Kara infaneto, vi devas iri al via patrino, por ke ŝi instruu vin pri tio. Tio ne povas esti mia tasko.“ Ŝi vizitis lin poste kelkajn fojojn en lia bohemia mansardo. „Unufoje diris Breĥt al mi, ke li permesos estontece nur unu ĉapelon po jaro al mi, sed ke li surprizos min

anstataŭ tio en la iro de la tempo kun sep infanoj.“

Pri Marinjo A. skribis Breĥt en letero al Caspar Neher: Mi do ne plu povos kisi Rozmarinjon (ŝi havas, malsekajn plenajn lipojn en la pala soifa vizaĝeto). Sed mi povos kisi aliajn, kompreneble. Mi vidas mil buŝojn antaŭ mi, kiuj sopiregas kison de mi. Tridek jarojn mi donas al mi kaj kvin kontinentojn. Sed Rozmarinjon mi do ne... Kruco kaj diablo! Kio estas mil ebloj kontraŭ unu maleblo? Forgesita estas la forto = fuĝo pro - malforto. La plej alta estas preni, kion oni povas preni al si. Kaj la alia? Sed la alia, kion oni ne povas...? Ne povas ekzisti dio, ĉar alie mi ne povus elteni tion, ne esti dio. Kiu ne ridas pri tio? (Ankaŭ la ridado estas iaspeca forto de la malfortuloj!)“ (letero, 12-18-1917)

La poemon la junulo Breĥt verkis en trajno en la jaro 1920, ankoraŭ tute ne disigita de ŝi. Sed li jam divenis ĉe la verkado de tiu poemo, ke Marinjo baldaŭ estos por li nur alta blanka nuboj en la ĉielo.

Pri la tempo, kiam tiu poemo ekestis, li verkis la sekvan: „Tiu someron mi ne faris multon, mi iom naĝis, legis kelkon, nenion amis. Sed mi ne pigris. Mi devis transŝoveli mortintojn kaj

kutimiĝi je ilia aspekto. Pli terure ol tio, ke mi faris nenion, estis tio, ke mi komencis multon. Almenaŭ kelkaj baladoj estas pretaj. Ankaŭ la segolaboro je la branĉo, sur kiu mi sidas, progresas, kvankam lante. Sed la sekurecon mi ankoraŭ forpelos el mi.“ (taglibroj, 12-26-1920). Sed, ke li verkis tiun grandiozan poemon, li ne menciis, evidente tial, ĉar la grandaj aferoj okazas ĉiam kvazaŭ preterire. (cez)

Transen de l' montoj

Transen de l' montoj
flugas hom' laŭ plan'.
Grandas verkoj, kontoj.
Sed por multaj mankas plu la pan'.
Estas plu malsatinfan'!

Inter kontinentoj
telefonas hom' kun hom'.
Centmil manoj, sentoj,
etendiĝas de dom' al dom'.
Homaran'!
Se kunagos ĉiu man'!

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Über die Berge“ de Bertolt Brecht

CHARMS

Flugas la aerbalonoj

La perpleksiga kato

Strangaj paĝoj

Flugas la aerbalonoj

En ĉiel' aerbalonoj
flugadas en la blu'.
En ĉiel' aerbalonoj
klaktuŝsas sin je ĝu'.
Enĉielas la balonoj,
postĝisas ilin ar'.
Enĉielas la balonoj,
postĝisas ilin ar'.
Enĉielas la balonoj,
la homoj svingas ĉapojn.
Enĉielas la balonoj,
bastonojn svingas homoj.
Enĉielas la balonoj,
la homoj svingas bulkojn.
Enĉielas la balonoj,
la homoj svingas katojn.
Enĉielas la balonoj,
la homoj svingas seĝojn.
Enĉielas la balonoj,
la homoj svingas lampojn.
Enĉielas la balonoj,

la homoj staras plu.
En ciel' aerbalonoj
klaktuŝas sin je ĝu'.

trad. Hans-Georg Kaiser

laŭ „Im Himmel fliegen Luftballons“

La perpleksiga kato

Jen kato, kiu sin vundis tre krure,
ĝi jam ne kuradas, komplikus por ĝi.
Ni helpu al ĝi do, kuracu plezure.
Aerajn balonojn tuj portu al ni!

Kolektas sin jam la homoj strat-starte,
admiras la katon jubile de l' ter'.
La kato promenas, almenaŭ do parte,
sed parte jam ŝvebas laŭ bird' en aer'!

tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Die verblüffende Katze“

*PS: „Strangaj paĝoj: Elektitaj poemoj kaj rakontoj por
infanoj“ (germanen tradukitaj)*

Rimarko

Charms estis rusa verkisto.

Strangaj paĝoj

Kiaj paĝoj strangaj,
kun fuĝbirdar' ĉevangaj.
Tute strangaj birdoj.
Kaj jen!
Tiaj strangaj homoj,
krome strangaj palmoj
eĉ la plej strangaj laŭ mi.
Ĉiele kunigas sin
al la stranga Suno
same stranga Luno.
Sed ni, ni
rigardas la paĝojn,
ridetas supere.
Tio estas mondo el paper'.

*tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Seltsame Seiten“*

Rimarko

„Estas malfacile diri ion pri Charms al iu, kiu scias nenion pri Charms. Charms estas granda verkisto. Napoleono ne estas tiel granda kiel Charms, kaj Bismarck estas kompare al Charms nenio. Kaj tiaj, kiaj Lenin, Stalin kaj Trockij estas kompare al Charms simple sapvezikoj. Entue ĉiuj homoj estas nur sapvezikoj rilate al Charms.“ (laŭ Daniil Charms)

GOETO

Amo kontraŭvola

Antaŭ la pordego (Paskopromeno)

Kanto de l' turogardisto

La brakoj de l' dioj

Memoro

Plia tia Trovita

Amo kontraŭvola

Mi scias bone, mokas tre:
Vi inoj, mem ne konas vin!
Vi amas laŭ kartludo, ve!
Davidon, Aleksandron,
kaj tiujn kvazaŭ kiel mantron.
Kaj ili mem tre ŝatas sin.

Mi mem mizeras ĉiam nur
kun mizantropa fi-vizaĝ'.
Pro sklava am' en ombra spur'.
Volonte perdus mi l' doloron
borintan sin en mian koron.
Ne venkas amon mok' sen saĝ'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Die Liebe wider Willen“ el „Ampoemoj de Goeto“,

Eldonejo Haffmann

Rimarko

Ke la juna duko kun la juna Goeto sovaĝe kuradas tra la vilaĝoj, kaj ke ili kune ebriiĝas kaj en tiu stato eĉ delektiĝas je diversaj servopretaj junulinoj el la popolo, asertis onidire la loĝantoj en la kamaparo de Vajmaro tiam, kiam ekestis la poemo.

Antaŭ la pordego

Liberas la rivereg' kaj rojoj
de glaci', gajigas printempa sfer',
en valoj verdas floesper'.
Maljuna vintro sur fuĝaj vojoj
retiras sin sur montojn de l' ter'.
De tie sendas ĝi hajlojn nur,
senpotencajn grajnojn, sur l' herban flankon;
kun frostaj strioj sur verda natur'.
Sed la sun' ne toleras la blankon.
Ĉie vigliĝas kresko post nasko,
ĉio volas viviĝi je Pasko.
Sed la floroj raras eĉ plu,
buntvestaj homoj samas por ĝu'.
Turnu vin nun de tiu alto
al la urbo do dum halto!
El pordego, nigra tru',
svarmas bunta ara flu'.
Ĉiuj subsunas kun insist'
kaj festas la releviĝon de Krist',
eĉ releviĝis ja persone:

el etaj dometoj, mornaj tentoj,
el metia devig' elfone,
el la ŝarg' de gablaj tegmentoj,
el malvast' de strata fatraso.
El nokt' honorinda de l' preĝej'
vokis ilin la lum' post kre'.
Vidu, kiel kuras la amaso
tra ĝardenoj kaj kampoj, pro ĝi,
kiel la river' dum paso
boatojn gaje drivigas sur si.

Kaj troŝargita ĝis sinkado
moviĝas for la lasta bark'.
Eĉ el la alt' de montopado
brilas vestara bunt' kiel ark'.
Aŭdiĝas jam popola bruo.
Jen la ĉiel' de vera ĝuo!
Jubilas ĉiu kun pasi':
Jen hom' mi estas, rajtas mi!

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ: „Vor dem Tor“

Rimarko

La poemo estas pli konata sub la titolo „Paskpromeno“. Ĝi troviĝas en la teatraĵo Faŭsto I.

Kanto de l' turogardisto

Por fari, naskite,
rigardojn en rond',
de l' tur' inspire,
min plaças la mond'.

Rigardas mi foren,
proksime kun verv',
al Luno, stelaren,
arbaren, al cerv'.

Mi vidas je ĉio
eternon kun em'.
Laŭ plaĉo pri tio
kun plaĉ' al mi mem.

Bonfartaj okuloj
kun kiu ajn cel'
kaj kia ajn estis,
min ravis per bel'!

tradukis Hans-Georg Kaiser

laũ „Türmerlied“

La brakoj de l' dioj

Senkuraĝemo,
ŝanceliĝemo,
in-hezitemo,
plend' kaj timemo
turnas la aĉon
ne al liber'.

Spiti perforton,
rezisti la sorton,
ĉiam senkline
forti obstine
vokas la brakojn
De l' dioj al Ter'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Die Arme der Götter“

Rimarkoj

Originale la poemo estas sen titolo, la titolo estas aldono de H.-G.Kaiser. La poemo estas el „Goethe-Gedichte“ Gedichte der frühen Lebensjahre („Goeto-poemoj, Poemoj el la fruaj vivojaroj. Eldonejo C.H.Beck Munkeno)

Memoro

Kial al la for' avanci?
Estas bonoj tie ĉi.
Lernu dum okaz' bonŝanci,
ĉiam eblas, tuj ĉe vi.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ: „Erinnerung“

Plia tia

Sur ĉiuj montoj tronas
silent'.

La arbojn kronas
laŭ la sent'
eĉ ne ventem';

birdetoj silentas arbare.
Baldaŭ, senfare
dormos vi mem.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Ein Gleiches“

Rimarkoj

La poemeton „Plia tia“ Goeto verkis kvindek jarojn antaŭ sia morto al la lignovando de ĉaskabano sur la monto Kickelhahn (Subridetkoko) ĉe Ilmenau kaj donis al ĝi la saman titolon. Ĝi havis la saman temon kiel alia poemo verkita de li antaŭe por la damo de Stein.

En aŭgusto de la jaro 1831, duonan jaron antaŭ sia morto, li vizitis la kabanon lastan fojon kaj tuj grimpis en la supran etaĝon por rigardi, ĉu sia, de li jam foje renovigita poemo, plu legeblas sur la lignovando. La montinĝeniero Mahr, lia akompananto raportas tiel: Goeto legis la malmultajn versojn kaj ploroj fluis el lia vizaĝo trans la vangojn. Tute lante li eltiris neĝe blankan tuketon el sia malhele bruna vesto, sekigis la vizaĝon kaj diris softe: „Jes ja, baldaŭ vi dormos mem!“ Li silentis duonan minuton, rigardis ankoraŭfoje tra la fenestro en la mornan picean arbaron kaj tiam turnis sin al mi kun la vortoj: „Nun ni denove ekiru!“

Trovita

Arbare iris
Mi kaj dum sol'.
Ne serĉis ion.
Jen mia vol'.

Floreton vidis
Enombre mi.
Okule belan.
Stellumis ĝi.

Mi rompi volis
Ĝin. Sed jen ĝi:
„Ĉu nur por velko
Min rompos vi?“

Elfosis mi ĝin
Do kun zorgem'.
Ĝardenen ĝin portis
Al bela hejm'.

Mi ĝin enplantis
Ĉe l' dom' sen vort'.
Kviete ĝi kreskas
kun flora fort.'

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Gefunden“

Rimarko

La poemon li verkis por la amatino kaj posta vivkunulino Kristiane Vulpius, kiun li unuafoje renkontis en parko en Vajmaro. Ŝi fariĝis por li poste tiom grava kiel la iama monaĥino Katarina de Bora por Marteno Lutero. (cez)

GRIFIO

Andreo Grifio

Vantas ĉio

(Verkita en la jaro 1643)

Vi vidas kie ajn nur vanton sur la tero.
De l' hom' kreitan, frakazos hom', ho ve.
Kaj kie urboj tronas, etendos sin herbej'.
Paŝtistin' kun greg' vagados en ĉi sfero.

La floropompo nuna, ekkuŝos distretite.
Urĝul', spitul', ost' iĝos, cindro de person';
Nek estas aĵ' eterna, nek fer' nek marmorŝton'.
Nun ridas la feliĉ', sed tondros plendoj spite.

La glora ag', la fam' laŭ song' perdiĝos, svenos.
Ĉu en la lud' de l' temp' l' facila hom' sin tenos?
Ja kio estas ĉio de ni celata

krom aĉa sensencaĵ', krom ombro, polvo aŭ vent',
krom floro sur herbejo pasema post moment'?!
Sed eternec' ne estas pripensata.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ: „Alles ist eitel“ de Andreas Gryphius

HEINE

(Bonvolu prononci: Hajne)

Amata, ni sidis kune
Bonŝanc' esta flirtema damo
En admirinde bela maj'
Frenezemo
Junulo amas inon
Kie?
Kun obstin' tra l' anim'
La papili' al la roz' enamiĝis
La plej belan ampoemon...
La rondo sidanta tetable
La sklavoŝipo
Lazaro
Lorelaj
Vi amas min, mi scias

Amata, ni sidis kune

Amata, ni sidis jen kune,
intime en boat'.

Ni nokte drivis mallume
sur vasta akvostrat'.

Fantominsulo tre bela
sublune dormis en tranc'.
Jen kanto kara, hela,
ondada nebulodanc'.

Jam sonis eĉ pli kare,
plaŭdetis la ondad'.
Ni preterdrivis surmare
sur trista nia pad'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Mein Liebchen, wir saßen beisammen“

Bonŝanc' estas flirtema damo

Bonŝanc' estas flirtema damo,
restadas nur dum unu hor',
karesas vin sur l' frunt' kun amo
tuj kisas vin - kaj iros for.

In' Malfeliĉo tute male
tre premas vin al sia kor',
ŝi ne rapidas, joviale
ĉe l' lito trikas kun fervor'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ: „Das Glück ist eine leichte Dirne“

el: Tiel tenere, kor' ĉe kor' . La plej belaj ampoemoj

En admirinde bela maj'

En admirinde bela maj',
dum jam burĝonoj krevis,
jen ankaŭ miakore
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',
dum birdotril' senbridis,
jen mi al ŝi sopirojn,
dezirojn, ekkonfidis.

tradukis Hans-Georg Kaiser
el „Lyrisches Intermezzo“
im „Buch der Lieder“

Frenezemo

Stultaĵojn mi faris, stultaĵojn dum vag'.

Stultaĵojn plu mi eĉ faris.

Mi faris ilin dum nokt' kaj tag',

la noktaj eĉ pli barbaris.

Mi faris ilin sur ter' kaj mar',

ekstere kiel hejme.

Mi faris multajn kun mensa klar',

eĉ tiujn plej stulteme.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Narretei“

Junulo amas inon

Junulo amas inon,
nur volas alian ja ŝi.
Sed tiu amas alian
kaj iĝas edz' pro pasi'.

La dam' pro ĉagren' edziniĝas
al iu ajn plia vir'
kuranta unue vojen.
Suferas li pro l' dezir'.

Ĝi estas malnova rakonto,
sed nova ĝis ĉi hor'.
Al kiu ĝi okazas,
rompiĝas ties kor'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ: „Ein Jüngling liebt ein Mädchen“

Kie?

Kie la migrul' kun laco,
Kie laste kuŝos mi?
Ĉu sub palm' en sud' en paco?
Ĉu ĉe Rejno sub tili'?

Ĉu dezerte min sen ordo
Entombigos fremdular'?
Ĉu mi kuŝos ĉe la bordo,
En la sablo do ĉe mar'?

Almenaŭ ja palpebrumos
Ĉie la ĉiel' de Di'.
Jen mortintolampoj lumos,
Steloj nokte super mi.

tradukis Cezar

laŭ „Wo?“

Rimarko

Tiu ĉi poemo estis trovita en la postlasaĵo de Heine.- Ekde 1901 ĝi kiel epitafo de Heine legeblas sur la tombo de Heine en la tombejo Montmartre.

Kun obstin' tra l' anim'...

Kun obstin' tra l' anim'
iras tintilado.

Sonu, kanto kun inklin'
monden en beato.

Iru son' ĝis la dom',
kie floroj ludas.
Se jen kreskas roz' en fon',
diru: Mi salutas!

tradukis Hans-Georg Kaiser

Rimarkoj

Senpene mi estus povinta komenci la poemtradukon per: „Kun sublim' tra l' anim'“, sed mi ne faris tion, ĉar la rimoj en mia traduko ne estu puraj, tio estas mia intenco, ĉar ankaŭ la rimoj en la originalo de Heinrich Heine ne estas puraj. Certe tio estis lia speciala intenco. Laŭ mia opinio la eltrovema poeto volis pruvi, ke malpuraj rimoj ne nepre devas esti malpli

taŭgaj ol puraj. Simila validas por E-o. La E-poezio estus mizere malriĉa, se ĝi limigus sin nur je puraj rimoj. Eĉ la plej bela tintilado per puraj rimoj ne povas kaŝi la fakton, ke la homoj denove kaj denove eksperimentas pri diversaj rim-kaj esprimeblecoj. La vivo ja ne estas tiel pura kiel pura rimo kaj ankaŭ ne vitroperla ludo en ebura turo, sed batalo, kontraŭdiro, eterna ŝanĝiĝo.

En kantoj la eksperimentemo rilate malpurajn rimojn estas eĉ multe pli granda ol en poemoj. Je la unua rigardo tio estas perpleksiga, sed muzikistoj ja tre konscias pri tio, ke la muziko ne ĉiam povas konsisti nur el harmonioj. La ĵazo estas genia esprimo de nia tempo! La homara instinkto rafini kion ajn, montras sin ankaŭ en la altkvalita liriko. (cez)

Novaj poemoj
Nova printempo
(1831)
Prologo

7

La papili' al la roz' enamiĝis,
Flirtadas ĉe ĝi kun jubil'.
Sed ĝin mem kaj kun ora bel'
Flirtdancas amante la sunobril'.

Al kiu estas la rozo en am'?
Se mi nur scius ĝin!
Ĉu al la kantanta najtingal',
Ĉu al la stel' Venus' je la fin?

Ne scias mi, kiun amas la roz';
Sed ĉiujn amas mi!
Vin, roz', sunbril', Venuso-stel',
Najtingal' kaj papili'.

trad. Hans-Georg Kaiser

laŭ Der Schmetterling ist in die Rose verliebt...

La plej belan amproponon...

La plej belan amproponon
Vi timeme nur ignoras.
Al demand': „Ĉu pro rifuzo?“
Vi subite eĉ ekploras.

Mi malofte Vin alpreĝas.
Dio, helpu ŝin superbe!
Nun sekigu ŝiajn plorojn
Kaj lumigu ŝin encerbe.

tradukis Cezar

laŭ „Meinen schönsten Liebesantrag...“

La rondo sidante tetable...

La rondo sidante tetable
parolis pri l' am' kun prudent',
la viroj science afable,
la damoj subtile kun sent'.

La amon deziras platona
la magra kortegist'.
Post: „Ha!“ la edzino moksona
ridetas nur kun persist'.

Fraŭlinon pastro instruas:
„Ĉe am' ne estu krudec',
ĉar tio la sanon detruas.“
Ŝi lispas: „Ho, jes?“ kun dec'.

Grafino diras kun veo:
„Pasio estas la am'.“
Ŝi donas tason kun teo
al la baron' post deklam'.

Ĉe l' tablo loko plu solas.
Jen mankas nur vi, amatin',
vi tiel bele parolas
pri via amo kaj vin.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Sie saßen und tranken am Teetisch“

La sklavoŝipo

1

La kargkomercist' Mynheer van Koek
sidante kun nombras kajute,
kalkulas kaj pri la kargvalor'
kaj pri l' profito entute.

„Bonegas la pipro, bonegas la gum',
amason da ili mi havas.
Enŝipas oro, eburo eĉ –
la nigra varo pli gravas.

Sescent negrojn, ridindis la prez',
mi prenis al mi Senegale.
Pro l' firma karn', kaj ĉiu tenden'
elastis kvazaŭ ŝtalo.

Mi donis en la interŝanĝ'
ŝtalaĵojn, bidojn kaj brandon.
Okcentprocentos tial la gajn',
se vidos nur tricent la strandon.

Restos de l' negroj duono nur
havene de Rio-Janeiro,
pagos po cent dukatojn al mi
l' firmao Gonzales Perreiro.“

Pro interromp' *Mynheer van Koek*
nun haltas pri sia fervoro,
la ŝipkuracist' envenas al li,
van Smissen, la doktoro.

Li estas skelete svelta figur'-
verukoj surnazas araj.
„Nu, marokirurg'“, ekkrias van Koek,
ĉu sanas la negroj karaj?“

„Jen mian dankon“, diris la doktor',
„mi venis, ĉar mi informas,
ke lastanokte la mortec'
progresis kaj enormas.

Po tag' ĝis nun nur mortis du,
hodiaŭ sep formortis.
Kvar viroj, tri inoj – mi tuj sen hezit'
la perdon ŝiplibre raportis.

Mi zorge kontrolis je ĉiu mortint',
ĉar tiu ruza aro
per ŝajna mort' forŝtelas sin
ĵetite al la maro.

De ĉiu mi prenis la ĉenojn for
kaj kiel kutime plue,
mi lasis ĵeti ilin de l' ŝip'
jam enmatene frue.

Elsagis jen baldaŭ el la ondar'
la ŝarkoj, grandaj kvantoj.
Ŝatantoj estas pri negrokarn',
de mi estas pensiantoj.

La ŝarkoj sekvis nin sur la voj'
de l' ŝipo ekde la bordo.
La fiaj bestoj elflaras ja tuj
kadavrojn por grasa mordado.

Komikas tiom la observ',
se ŝarkoj kadavrojn mordas!
Jen kapt' je kap' jen kapt' al krur'.
La rest' intestojn distordas.

Vorinte ĉion, petolas la ar'
kontente la ŝipoflankojn,
gapante al mi, kaj ŝajnas eĉ,
volonte dirus eĉ dankojn.“

Ĝemante interrompas lin
van Koek : „Kiel mi povos
malhelpi, ke kreskos plu tiu plag'?
Ĉu sin rimedo trovos?“

Van Smissen rediras : „Pro propria kulp'
tre multaj negroj jam mortas.
Elspiroj de l' negroj en la hold'
haladzojn ŝipfunden portas.

Kaj kelkaj mortis pro melankoli';
mortigas la troa enuo.
Sanigos ilin do aer',
muzik' kaj dancoĝuo.“

Jen vokas Koek : „Brila konsil'!
Vi saĝas eĉ pli, doktoro,
ol iam la Aristotel':
de l' granda grek' la mentoro.

La prezidant' de la societ'
en Delft por la greft' de l' tulipo
prudentas tre, sed estas li
rilate al vi nur ŝtipo.

Muzik! Muzik'! La negroj do
ekdancu ferdeke de l' ŝipo.
Se iu jam satas pri la amuz',
li hope saltu per vipo.“

2

De l' alt' el blua firmament'
rigardas stelomiloj
sopire lumas kaj kun saĝ',
kun inaj okulaj briloj.

La steloj rigardas al la mar'.
Jen kuŝas vastaj rondoj
en fosforeska purpurfarb';
Volupte kveras la ondoj.

Ne flirtas veloj sur l' sklavoŝip'
Laŭ ŝajn' sen rig', surmara.
Lanternoj briletas sur la ferdek'
ĉe dancmuzik' barbara.

Stiristo violonas nun,
kaj flutas kuiristo,
ŝipbubo batas sur la tambur',
trumpetas la kuracisto.

La inoj, viroj, ŝajnas eĉ cent,
jubile saltante baraktas
freneze eĉ, ĉe ĉiu salt'
la feroj tinte laŭtaktas.

Sovaĝe surstamfas la plankojn la ar'
kaj kelkaj negrulinoj
sin kroĉas volupte al nuda amik'-
eksonas ĝemaj kulminoj.

Gardist', la *Maitre des plaisirs*,
per vip' stimule pelis
dancistojn pigrajn al gajec',
ke ili ĝoju, celis.

Kaj violonad! Kriad' kaj ĉin bum!
La bru' el la profundo
logas monstrojn de l'akva mond'
el stulta dorm' sur grundo.

Centoble ŝarkoj alnaĝas pro ĝi,
dormeme ili venas;
kaj gapas al la ŝipferdek',
perpleksas, ne komprenas.

Ne venis jam la matenmanĝ',
oscedaj ŝarkoj, ĝin sentas,
malfermas la faŭkojn, makzeloj jen
dum montroj segodentas.

Kaj violonad'! Kriad' kaj ĉin bum!
ne haltas la dancoj pluire.
La ŝarkoj primordas sen pacienc'
la proprajn vostojn ŝire.

Mi pensas, ne plaĉas ŝarkojn muzik'
laŭ multaj el tia ĉi bando.
„Ne fidu bruton sen am' pri
muzik'!“ Jen Shakespeare el Britlando.

Kaj violonad'! Kriad' kaj ĉin bum!
Ne haltas la dancoj pluire.
Ĉe l' antaŭmast' Mynheer van Koek
manpreme preĝas suspire:

„Je Kristo, lasu plu vivi por mi
la nigrajn pekintojn, Dio!
Se l' stultaj bovoj incitis vin,
vi scias ja bone pro kio.

La vivon do lasu, pro nia Krist'
mortinta por la homaro!
Se restos malpli ol tricent nur,
mi ne profitos de l' varo.“

tradukis Hans-Georg Kaiser

*el „Das Sklavenschiff“, H.Heine: Alle Werke, Band 1, Seite
258*

Rimarkoj

La sklavigo de la negroj, malpermesita en la britaj kolonioj en 1833, en la francaj en 1848, estis malpermesita de Usono nur en la jaro 1865, de Brazilo en la jaro 1871, kvankam ilia transportado el Afriko estis jam formale malpermesita en la jaro 1826.

„*Mynheer van Koek*“ (prononcu: majnhe:r! vankuk), ŝerca nomo, kiu signifas 'Sinjoro Kuko'.

Maitre des plaisirs (pr. metre deplezir!): aranĝanto kortegaj baloj kaj baletoj.

Rio Janeiro: Rio de Janeiro, iama ĉefurbo de Brazilo.

Lazaro

1.

KURO DE L' MONDO

Havas multon iu ul',
aldonegon li ricevos.
Se malmulton havas hom',
li eĉ tion doni devos.

Se vi estas sen posed',
entombiĝu, homa nulo.
Rajton vivi, vi, fripon',
havas nur la posedulo.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Lazarus“

Lorelaj

Min kaptas malgajo de l' koro,
pro kio tiu trist'?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trankvilas,
malhelas jam la Rejn'.
La monto surpinte brilas
vespere en suna scen'.

Tre ĉarma feino sidas
jen supre por ador';
la ora ornamo ridas;
ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kombilo
kaj kantas kun pasi';
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi'.

Ŝipisto ŝipeton gvidas.
Lin kaptas ve' pro ekzalt'.
Li ja la rifojn ne vidas,
li vidas nur supren sen halt'.

Mi pensas, ke ondoj tiros
la ŝipon funden de l' Rejn';
kaj tio de l' kant' eliros
de Lorelaj-siren'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Die Loreley“

Vi amas min, mi scias...

Vi amas min, mi scias,
delonge sciis ĝin.
Sed kiam vi ĝin diris,
ĝi tre timigis min.

Mi iris sur la montojn,
ĝojkantis kun inspir'.
Mi ploris apud maro
en temp' de sunsubir'.

Jen koro mia lumas,
aspektas kiel flam',
kun bel' kaj grand' ĝi sinkas,
nun do en mar' el am'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Dass du mich liebst, das wusst ich“

HODJAK

Franz Hodjak

Kio koncernas vin

Kio koncernas vin

Bonvolu lasi min en paco!

Ne provu ĝin ĉiam denove

per tiuj artifikaj floroj

el tafto kaj papero.

Kiel mi ankoraŭ akceptu la trompaĵojn?

Kion vi imagas pri mi?

Ke mi estas sinohundeto,

unuiĝo de naivaj stultemaj onkloj,

mortinto?

Honeste dirate:

Vi tedegas min.

Tute ne eksidiĝu,

por ke vi ne denove devu eksalti,

se mi certigos al vi, ke

homoj kiel vi supozas,

ke homoj kiel mi

homojn kiel vin nur per gantoj aŭ tute ne rajtas

tuŝi.

Fariĝu nun ne sentimentala, cinikulo.

Se vi ne supozus vin senmortebla,

mi konsilus al vi

pafi kuglon en vian kapon.

Do finon!

Lasu min en paco!

En la nomo de la afero, vi diras,

la afero, ha, tiu do!

Sur kiu ŝultro de vi

mi plorsingultu?

Vizitu min ĉeokaze ankoraŭfoje,

eble ni tiam povos interparoli kune,

se vi pesos miajn vortojn

kun la sama pesilo

kiel viajn.

Viro, lasu la babilaĉon!

Mi estas nek kontraŭstarema,

nek malbonvolema,

nek acidulo,
nek aroga.

Ne, vere ne,
mi akceptas interparolon,
je la kondiĉo,
ke mi rajtas kunparoli.

tradukis Hans-Georg Kaiser

MATENSTELO

Ekskurso per fervojo

Fantomtimpomo

Jen dometo ĉe l' fervoj'

La akvo

La du paraleloj

La genuo

La kokino

Mevokanto

Mi amas vin, animo vagerara

Noktkantado de l' fiŝoj

Ŝi al li

Ekskurso per fervojo

Pum, pum, la fervoj',
ek al Herbejoplan' kun ĝoj'!

En la urb' Herbejoplan'
la brasikpapili' estas an'.

La brasikpapilia domicil'
aspektas kiel sonoril'

de blua kloŝflor' pro destin'!
Allogas la brasikpapili' kun in'.

Se tintas en vento la kloŝ' pro ĝi,
tre ekĝojas gesinjoroj Papili'

Pum, pum, la fervoj'
forlasas la urbon kun ĝoj'!

Al la arbar' nun kun kontent':
kaj ĝis Font-arbar-silent'!

L' estro de Font-arbar-silent',
la rano, kvakas dum moment':

„Kvak, kvak, eliru, kvak!

Ĉi tie estas nun Pasko-tag'!“

Tie en la lok' festhomoj paŝas,
Pask-leporo buntajn paskovojn kaŝas.

Ruĝaj kaj flavaj de ĉiu spec'.
La veturaj gastoj do serĉu kun dec'.

„Kvak, kvak, kvak! Plaĉu la vag'!“
„Ĝis revid'! Dankon! Vi, staciestro Kvak!“

Sub abioj, kverkoj, betuloj kaj fagoj
ni trovu la buntajn paskovojn post vagoj.

Sur musko kaj inter grandaj radikoj
infanoj nun stumblas post indikoj.

Ĉu ne? Kaj se ni do trovis jam ĉiujn,
en niajn saktolojn ni metos tiujn;

ni hejmveturos laste je l' fin',
elpakos miraĵojn ĉe nia avin'!

tradukis Hans-Georg & Dorothea Kaiser
laũ „Ausflug mit der Eisenbahn“

Fantomtimpemo

el „Ĉiuj pendumilaj kantoj“)

La flugilflaglo gaŭstras
tra l' tohuvabovorst',
la ruĝa fingur' plaŭstras,
terure gucas gorst'.

*tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „GRUSELETT“*

Rimarkoj

Se vi ne ĉion komprernas kaj ne trovas ĉiujn vortojn en PIV, ne afliktiĝu, ili parte ne ekzistas:!) Kaj tamen eĉ tia poemo estas tradukebla en Esperanton. Krome la poemo pruvas, ke eblas redoni impresan dadaisman poemon kun nekonataj aŭ ekzotikaj vortoj tute laŭregule eĉ en Esperanto. (cez)

Jen dometo ĉe l' fervoj'

Jen dometo ĉe l' fervoj'
sur montetoverd' ĉe voj'.

Tage, nokte, kiam ajn,
preterflugas trajn' post trajn'.

Se trajn' tondras laŭ raket',
tremas iom la domet'.

Kien iras, kie for',
ĉiu trajno kun fervor'?

Ho, kunprenu dum la rond'
la salutojn al la mond'!

Ŝrik', stamfad', ruliĝ' kaj fum'.
Mortsilent' post lasta lum'.

Pro l' tondrad' de la rel'
tremas iom la parcel'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Das Häuschen an der Bahn“

La akvo

Kaj sen vort kaj sen vort'
fluas akvo plu kun fort'.
Sed se dirus ion ĝi,
dirus ĝi nur tion ĉi:

„Fid', bier', pan' kaj am'.“
Sed ne novus la proklam'.
Montras nur, montras nur:
ke silentu la natur'.

tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Das Wasser“

La du paraleloj

Ekmigris du paraleloj
al la senfin' sen hom'.
Du rektkandelaj animoj
el burĝsolida dom'.

Ne volis ili sin tranĉi,
ĝis laste en la sfer',
ne volis sin disbranĉi,
sekrete pro fier'.

Sed post la deka lumjaro
migrinte tiel ĉi,
ne sentis la geo tere
entute plu pri si.

Ĉu pluis paraleloj?
Ne helpis eĉ cerbum'.
Kunfluis ili sen celoj
en fora eterna lum'.

Etern-lum' ilin traboris,
ekestis unu anim'.
Serafojn kvazaŭ voris
la eternec' je l' fin'.

tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Die zwei Parallelen“

La genuo

Genu' mondvagas en la vent.'

Estas genu', ne pli!

Ne estas arb' ne estas tend'.

Estas genu', ne pli.

Pro pafoj en milito vir'

formortis kun furor'.

Sen vund' nur restis la genu' -

kvazaŭ pro difavor'.

Solece vagas en la vent'

genuo do, ne pli!

Ne estas arb', ne estas tend'.

Estas genu', ne pli.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Das Knie“

el la kolekto de groteskaj tekstoj „Tango mortale“

Strigspegul-eldonejo (Eulenspiegelverlag)

La kokino

Stacidome iras en malĝusta lok'

la kokin'...

Foru ĝi.

Kie li? Ĉef' de l' staci'?

Ĉu do l' fin'

de l' kokin'?

Estu esper'! Laŭtu nia vok'!

Al ĝi nia tuta simpati'!

Eĉ ĉi tie, kie „ĝenas“ – ĝi!

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Das Huhn“

Mevokanto

Aspektas ĉiu mev' por mi
laŭnome kiel Emma,
kaj portas blankan veston ĝi,
je ŝrotpaŝ' tre mortema.

Mi pafas ne al mev' de l' ter'
mi lasas vivi ĉiujn
mi nutras ĉiun per paner'
aŭ sekvinbere iujn.

Ho, hom', neniam iam ni
atingos flugi meve.
Se estas Emma nome vi
kontentu sami reve.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Möwenlied“

Mi amas vin, animo vag-erara

Mi amas vin, animo vag-erara
en val' de l' vivo pro feliĉo deca,
mi amas vin, konfuzfrenez' amara,
jam ofte iĝis revo polv' etpeca.

Mi amas viajn ve-flugilojn lige,
celantajn loĝi ja en mi sen puŝo.
Penetri volus mi vin nur bonige
konservi vin interne sen fi-tuŝo.

tradukis Cezar

laŭ „Ich liebe dich, du Seele, die da irrt“

PS: *Christian Morgenstern = Kristiano Matenstelo*

Noktkantado de l' fiŝoj

—
U U
— — —
U U U U
— — —
U U U U
— — —
U U U U
— — —
U U U U
— — —
U U
—

Ŝi al li

„Ja eble estos lasta foj',
ke tenos manojn ni dum hor'.
ke kunos nia sang' kun ĝoj'.
Ho sciis vi pri la dolor'.

Ridetas vi kun hel' al mi,
vizaĝe brilas via ĝoj'.
Migranto, ja ne sentas vi,
ke eble estos lasta foj'.“

tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Sie an ihn“

MICHLER

Elinjo Miĥler **Se la amo vin portas**

Se oni amas vin, vi demetas ĉiujn maskojn sincere,
vi moviĝas malferme kaj libere.

Se oni amas vin, vi ne pro lert' valoras.

Se oni amas vin, oni vin mem adoras.

Se oni amas vin, vi ne ĉiam devas ridi, fanfari.

Jen ja vi povas eĉ plori pro tristo.

Se oni amas vin, vi rajtas eĉ erari.

Kaj vi tamen ne estas fiisto.

Se oni amas vin, vi parolas pri limoj,
viaj mankoj kaj febloj,

kaj vi ne devas silenti pri la timoj,

male al homoj sen tiuj ebloj.

Se oni amas vin, vi rajtas havi sopirojn,
aŭ, ke revo vin kaptas.

Spite stultecojn kaj preterirojn,
oni indulge kaj pace vin traktas.

Se oni amas vin, vi ne ĉiam demandas
pri la supozebla prez'.

Vin portas la am', eĉ se vi grandas,
kviete, preskaŭ sen pez'.

Trad. Hans-Georg Kaiser

laŭ „Von der Liebe getragen“ von Elli Michler

MÖRIKE

Eduard Mörike

Printempo

Bluan bendon primaver'
reflirtigas enaere.
Dolčas la odor' surtere,
divenigas pri esper'.
Revas la viol',
ke ĝi jam ekfloras.
Malproksime ludas harpa sol'.
Primavero jam
en muzik' sonoras!

Trad. Hans-Georg Kaiser

laŭ „Frühling“

NIEMÖLLER

Martin Niemöller

Min tio ne koncernas

UNUE ili forkondukis la komunistojn.

Mi ne estas komunisto.

Min tio ne koncernas.

TIAM ili forkondukis la socialdemokratojn.

Mi ne estas socialdemokrato.

Min tio ne koncernas.

TIAM ili forkondukis la ciganojn.

Mi estas nek romao nek Sinti-romao.

Min tio ne koncernas.

Tiam ili forkondukis la judojn.

Mi ne estas judo.

Min tio tute ne koncernas.

FINE ili forkondukis min. –

Kaj neniu plu ĉeestis,

kiu povus protesti.

tradukis Hans-Georg Kaiser

RINGELNAC

Afiŝkolonoj

Al vi

Bumerango

Ĉie estas miroland'

Ĝojo

Donacado

Dormetkanto

En la parko

La aventuristo

La espero

La plumo

Logiko

Matena volupto

Mi tiom amas vin

Suneca infanstrato

Printempo

Velŝipoj

Vivu la modo!

Virgenra poŝtmarko travivis...

Afiŝkolonoj

Jen staras afiŝkolonoj
solecaj laŭ lumotur'
en vent' el hurlaj sonoj,
jam molaj pro l' pluv' de l' natur'.

Kaj vokas, logas kaj laŭdas
el bunta paper' kun pasi',
minacas nin, pikas, nin fraŭdas,
mensogas eĉ pli ol ni.

Deŝiras jen vir' surŝtupare
de l' Litfas-kolon' de la vest'
afiŝojn matene krutfare
per fia, sed gaja gest'.

Kovrinte ĝin per forta gluo,
pri l' nudo pro ŝajna koler',
remetas li kun bruo
buntaĵojn al ties ekster'.

Teatro, aŭkci'...cigaretoj...
karitato.... rabmurd' ... kaj sport'...
protestoj... oficdir'... bedoj -
do ĉio per bildo kaj vort'.

Mi legas sen paŭz' ĝis la fino.

Min interesas ĉio ĉi.

Mi hejme al la edzino
parkere raportos pri ĝi.

Romanojn, poemojn, gazetojn

ne tiom ŝategas ja ŝi.

Ŝi aŭdos de mi raporteton;
ni vagos vespere laŭ ĝi.

Kiel en pluvo kaj vento

eltenas afiŝkolon',

ankaŭ ni ĉe l' tagkomento

ne preterhastu eĉ tute sen rekon'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Die Litfaßsäulen“ de Joachim Ringelnatz

PS: Sinjoro Litfaß estas la eltrovinto de la afiŝkoloroj.

Germane nomata: Litfaßsäule.

Al vi

Ili saltis el trajno dum vetur';
kaj eĉ sen dolor' pro plezur'.
Relmigris ili sen saĝo.
Post trajnkuntreniĝ' sur la spur'
ne sekvis knal', ridado nur.
Kaj plu iris la vojaĝo.

Ili paŝis tra muroj, tra ŝtona vand',
tra pikodratoj, tra dezerta land'.
Tra limhaltej', baraĵaj densoj
kaj minaca gest' de fusilar'
vagadis ili eĉ tra mar' –
Jen miaj pensoj. –

La kurso ĝustis, sen preterir'
ĝis al vi ili venis.
Paliĝis ili, ekstremis;
liberis tamen tre sen dir'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ: „Zu dir“ de Joachim Ringelnatz

Bumerango

Flugis iam bumerang'
Sed tro longis ja êe flank'.
Bumerang' – eê post hor' –
ne revenis el la for'.
La publiko eê dum hor'
ĝin atendis kun fervor'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Bumerang“ de Joachim Ringelnatz

Ĉie estas miroland'

Ĉie estas miroland'.

Ĉie vivo estas.

Ĉe mia onklin' en ŝtrumpruband'
ĝi ie proksime nestas.

Ĉie estas malhelec'.

Idoj patroj iĝas.

Eĉ nur moment' sufiĉas,
kaj jam mortas io je pec'.

Ĉie estas eternec'.

Se vi spiris al limak',

ŝrumpas ĝi endome.

Sed limako en konjak'
vidas musfantome.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Überall ist Wunderland“ de Joachim Ringelnatz

Ĝojo

Ĝojo ne eksilentu.
Ĝojo sen kaŝ' sin prezentu.
Ĝojo nur kantu, ridu kaj brilu.
Ĝojo dankemu dum tuta viv'.
Ĝojo homon flugilu.
Ĝojo l' animon travadu.
Ĝojo daŭradu
dum tuta viv'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Freude“ de Joachim Ringelnatz

Donacado

Donacu laŭ la potenc'
kaj, se dec' ĝin permesas.
Se l' ricevinto la donon pesas,
puru la konscienc'.
Donu do kun plezur',
laŭeble nur
laŭ via vi,
kaj opini', gust' kaj humur',
por ke via ĝojo pri l' procedur'
estu pago por vi.
Sprite donu, sen ruzem'.
Pensu en pac',
ke la donac'
vi estas mem.

trad. Hans-Georg Kaiser

laŭ „Schenken“ de Joachim Ringelnatz

Dormetkanto

Vol vi poteton?
Sent vi trinkpeton?
Kolbasetopreton?
Ek, kapklineton!

Ele ja fias tiu
nokt' fridfremda al ni,
manojn faldu, sciu,
la ĉemizon kisas Di'.

Dormu ĉi,
Estas mi,
panjo via, je si
laca kiel vi.

Mutu tial –
sen kial –
senpene –
Ne gapu pli.
Aŭdu kusene
Laŭ ĝi spiras vi.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laũ „Schlummerlied“ de Joachim Ringelnatz

En la parko

Ĉe eta arbet' staris kapreolet'
en reva beat' en kviet',
je l' dudektria kaj du.
Je la kvara de fest'
mi revenis en fru'.

Jen plu revis ankoraŭ la best'.
Mallaŭte mi iris - sen spir' kun diskret' -
kontraŭ la vent' ĉe l' arbet'.
Mi tuŝis la beston je unu heliks'.
Jen ĝi estis el gips'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ: „Im Park“ de Joachim Ringelnatz

Formikoj

Hamburge du formikoj hejmis,
veturon Australien emis.

En Altona sur la ŝose'
la gamboj ekdoloris, ho ve.

Kaj jen ili rezignis pro saĝo
pri la lasta part' de l' vojaĝo.

trad. Hans-Georg Kaiser

laŭ „Ameisen“ de Joachim Ringelnatz

Rimarko

Altona estas urbokvartalo de Hamburgo.

La aventuristo

„Kien aventurist', vi'?“

Transversen aldanĝere,
jen kie sonĝe Tere
mil jarojn pli fruis mi.

Mi volas drivi ie,
en mondoj videblaj al fremdul'.
Mi volas gajni, kapti ĉie
alian en vivmalregul'.

Ĉar transas ĉiam feliĉ'.
Min logas fora trembrilo,
min logas flustra sibilo
al eblo nebula en niĉ'.

Antaŭan je posedo,
sciitan el nun-for',
mi perdu post cedo.
Vojaĝas mi tra mia propra kor'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ: „Der Abenteurer“ de Joachim Ringelnatz

La espero

Tro grandas al la homoj respekt',
se tiuj trone ĉielas,
ni pro malsaĝ' - aŭ tim' aŭ neglekt'-
ne vidas, ke sube pelmelas.

Ni fidas maltroe al apudul'.
Ni revas maltroe maldorme.
Facile vivi pli povus ni
per interhelp' konforme.

Pli rajtus ni esti mem laŭ rekon',
laŭ beste pia rezono.
Je la plej pompa tomboŝton'
montriĝas tiom da bono.

Min tentas eĉ ne iom la em'
la temon nun plu disvolvi.
Problemojn havas ja ĉiu mem
kaj eblojn ilin solvi.

*tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Die Hoffnung“ de Joachim Ringelnatz*

La plumo

Plumeton plaĉis flugprogram',
sursable jen hipopotam'.

„Mi ĝin vekos!“ la plumo vokis ;
volonte ĝi iun provokis.

Ĝi do tiklis kun obsedo
la dikhaŭtulon sur la led.

La best' la buŝon ne plu bridis,
ĝi monstre sur la sablo ridis.

trad. Dorothea & Hans-Georg Kaiser

laŭ: „Die Feder“ de Joachim Ringelnatz

Logiko

En frida nokt' sub steloklar'
jen drivis apud Norderney
svahila nigra lipohar',
je l' tria hor' laŭ ŝip' kun gaj'.
Jen mankas ja pri multo klar'!
Pro kio drivas laŭ konstat'
en nokt' svahila lipohar'
je l' tria hor' ĉe l' Kategat'?

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Logik“ de Joachim Ringelnatz

Prononco

Norderney, prononcu: Nordernej (XxX)

Kategatt, prononcu: Kategat (XxX)

Matena volupto

Knalĝoj' vekigis mi kun fid'.
La koksojn mi tamburas.
Jen akva log' kaj sapa rid'!
Aerfreŝ', mi plezuras.
Jen riverencas la litotuk',
ĝi gratulas pri la bano.
Nigregaj ŝuoj pro eduk'
min „Moŝto“ nomas kun rikano.
En mi leviĝas la anim'
kun naz-tremiga aktivo
pro apetito eĉ sen lim'
pri matenmanĝ' kaj vivo.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Morgenlust“ de Joachim Ringelnatz

Mi tiom amas vin

Mi tiom amas vin!
Mi al vi, se vi ĝin bezonus,
eĉ kahelon el mia forno
donus.

Mi ne malicis al vi, hoj!
Min kaptas sento de trist'.
Ĉe l' deklivoj de l' fervoj'
lumas abunde genist'.

Jam for - bedaŭr'.
Mi vin ne forgesas,
vojaĝas.
Ĉio kun longa daŭr'
mutsaĝas.

La temp' sur voj'
ĉiun belon negas.
Jen eĉ boj',
la hund' ne legas,
skribul' ne estas.
Pro dev' ni ne restas.

Mi ridas.

Plej grave estas je kribrilo
truoj je l' fin'.

Mi tiom amas vin.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Ich habe dich so lieb“ de Joachim Ringelnatz

Suneca infanstrato

En infaneco frua mi
dum la suneca stratpetol'
feliĉis jam pri ŝton' aŭ foli',
jen mia tuta vol'.

Jaroj forpasis, nun serĉas mi
tiun sunecan straton sur l' voj'
por ree lerni de ŝton' aŭ foli'
kiel funkcias la ĝoj'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Die sonnige Kinderstraße“ de Joachim Ringelnatz

Printempo

La arboj la fornnon nutras.
La birdoj logas sur gril'.
La sunombreloj plu putras.
Cetere regas trankvil'.

Kapetojn etendas laduje
la asparagoj por bal'.
Girlandoj kun rozoj rozuje
volviĝas en festkarnaval'.

Alvenas pro sonorilo
la ĉefkelner' laŭ task'
al mi kun ovoĵ – eĉ mil, ho,
metitaj de sturg' de Pask'.

Jen dolĉa odor' havana,
cigaro kun ringa spur'.
Mi sentas je mia Suzana
vekiĝon de nova natur'.

Ja indas foje amemo
al ont', ne-est', praa jar'.
Mi skribis printemppoemon
enfride de februar'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Frühling“ de Joachim Ringelnatz

Velŝipoj

Velŝipoj havas la maron sub si
kaj super si nubojn kaj stelojn.
Veturojn permesas ĉielenergi',
gvatnestoj la forajn celojn.

Ili dancas kokete laŭ sortruband'
ebriaj laŭ papilioj,
tamen transportas de land' al land'
valorojn kun spert' kaj scioj.

Jen vente ili lulas sin
rosrete kovritaj tra ondoj,
jen alta art' kun pacanim',
kun fervor' sen tromp' tra mondoj.

Libero jen bruas, odoras je mond'.
Natur' fariĝis la plankoj –
la veloŝipoj – heligas en rond'
la pensojn al vastaj flankoj.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Segelschiffe“ de Joachim Ringelnatz

Vivu la modo!

Por la modo, ne kontraŭ ĝi,
estu l' hom'! – Pro l' ĝoj',
eĉ se pro l' energi'
ne timigas ĝin kiĉ'.

Ĉu ĝi mal-aŭ-plilongigas
ĉu aliigas laŭ vast',
ĉiam mi ĝin glorkantligas,
ĉar ĝi ridas sen prokrast'.

Kosmen ni ĝin jodlu
por tajloroj je l' gajn' –
Modo vivu kaj viv' modlu;
ambaŭ estas pli ol ŝajn'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Es lebe die Mode!“ von Joachim Ringelnatz

Virgenra poŝtmarko traĝuis...

Virgenra poŝtmarko traĝuis
Tre belan, ĝis li ekguis.
De principin' lekite ĝis ekflam',
li vekiginta troviĝis en am'.

Rekisi ŝin li ja revus,
Se li ne vojaĝi devus.
Li amis sen perspektivo.
Jen la tragiko de l' vivo!

tradukis Hans-Georg Kaiser

*laŭ „Ein männlicher Briefmark erlebte...” de Joachim
Ringelnatz*

RILKE

Aŭtuno

La pantero

Aŭtuno

Folioj falas kvazaŭ el la for',
jen kvazaŭ velkus en ĉiel' ĝardenoj.
Faladas ili kun neanta gesto.
Kaj nokte sinkas peza ter' sen vesto
el ĉiuj steloj al solec' sen flor'.
Ni ĉiuj falas, eĉ ĉi man', sen knal'.
Aliajn vidu, estas ja en ĉiu.
Kaj tamen helpas iu, tenas tiu
tenere ĉion softe dum la fal'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ: „Herbst“ de Rainer Maria Rilke

Rimarkoj

Mi tradukis ĝin pro la peto de Elbertinum. Ankaŭ mi mem trovas la poemon mirinda, ĉar ĝi metas la demandon, kial ni povas havi la senton de protekteco en la mondo, kvankam ni ĉiuj iam mortos kaj falos el ĝi? Mi mem pensas, ke harmonia vivo estas la ŝlosilo al tia feliĉa sento. La volo vivi, la bonfarto pro laŭnatura vivo mem eble kreas tiun kontentecon en ni. Por

tio ne nepre iu Dio necesas, kiun Rilke aludas. Sed egale, kiel oni nomas tion, Dio aŭ Nekonata Estaĵo aŭ monda principo, la harmonio de l' vivo kun la naturo estas miraklo, kompreneble ankaŭ la forto, kiu tenas planedojn en ties orbitoj tiel, ke ni povas vivi. Kiel infano mi ofte sentis min feliĉa, speciale en la brakoj de mia avino, kiu estis Diino mia, pro ŝia amo al mi, mi sentis min ĉiam sekura, ne povis fali, tiel kiel en la brakoj de mia edzino nun. Kaj se mi mortos, jen espereble kun rideto sur la lipoj, kaj kun mia protektanĝelo je mia flanko, sen ĝeni per mia foriro la grandan harmonion de l' vivo. Ĉar vivo supozeble ankoraŭ longe estos, ankaŭ post nia foriro. La homa vivo estas miraklo, kiu konsistas el naskitoj, forirantoj kaj foririntoj. Kaj tial neniu simple forĵetu la vivon sen kaŭzo, ĉar ŝi aŭ li ricevis ĝin nur unufoje en la tuta neimagebla nelimigita eterneco kaj ĉar la vivo meme estas limigita, oni uzu ĝin por io utila aŭ io bela aŭ simple nur por ami iun aŭ ion. (cez)

La pantero.

En la ĝardeno de plantoj, Parizo

Pro preterpasoj de l' kaĝstangoj
fariĝis laca la panter' dum' rond'.
Li sentas stangomilon ĉe la vangoj,
sed post la stangomil' ne estas mond'.

Kun firma paŝ' elasta kun komplezo
turnas la best' sur lok' sin en izol',
jen kvazaŭ danc' de forto ĉirkaŭ mezo,
en kiu obtuziĝis granda vol'.

Nur iafoje, laŭ kurten', pupilo
malfermas sin - jen glitas bild' en ĝin,
trairas membrojn, streĉon de trankvilo
kaj en la koro perdas sin.

Trad. Hans-Georg Kaiser

laŭ „Der Panther.“ de Rainer Maria Rilke

RUMI

Mi estas...

(laŭ la germana traduko de Frederiko Rückert. 1819)

Mi estas Suno supre, pulver' de Sun', detal'.
Polvet', vi do restadu, foriĝu, Sun', en pal'!

Matenobril' mi estas, kaj spiro de l' vesper',
Susur' en bosko ankaŭ, en mar' ondara fal'.

Mi estas mast', stirilo, stiristo kaj la ŝip'.
Pro mi la ŝip' pereas, pro klifo de koral'.

Mi estas birdkaptisto, la birdo en la ret'.
Mi estas bild', spegulo, reson' kaj eĥa mal'.

Mi estas arb' de vivo kaj poste plu papag'
Silento kaj la penso, la lang' kaj sona skal'.

Mi estas spir' de fluto, de l' homoj la spirit',
Fajrero en la ŝtonoj kaj orvid' en metal'.

Mi 'stas ekstaz', la vito, vinberpremil' kaj most'
Trinkul' kaj enverŝulo, pokalo el kristal'.

Kandel' kaj orbitulo de ĝi, la papili'.
La roz' kaj - en ebrio pro l' roz' - la najtingal'.

Sanig' mi as, malsano, venen' kaj malvenen'.
La dolĉa, la amara, mielo kaj la gal'.

Mi as milit', la paco, batallok' kaj la venk'.
La urb', la protektanto, sturmist', rempar' kaj val' .

Mi as la kalk' la trulo, la majstro kaj la fend'.
La bazŝton' kaj la gablo, la nova dom', disfal'.

Mi estas cerv', leono, ŝafido kaj la lup'.
Mi as paŝtist', enfermas ĉiujn en sama stal'.

Mi as estaĵoĉeno kaj de la mondoj ring'
De l' kreo la eskadro, leviĝo kaj la fal'.

Mi ĉio as, nenio, mi as, ho, sciiu do,
Dŝelaleddin, ha, diru: l' animo de l' real'.

Trad. Hans-Georg Kaiser

laŭ „Rumi“ de Maulana Dschelaleddin (1207-1273)

ŜILERO

Frederiko Ŝilero Espero

Parolas, revadas la hom' kun bel'
pri ontaj pli bonaj tagoj;
al tempo feliĉa, al ora cel'
homoj hastas kaj kuras dum vagoj.
Oldiĝas l' mond', reĵunas dum kur',
sed la hom' esperas pli bonan nur.

Espero gvidas en vivon nin,
ĝi flirtadas ĉe ĝojplena bubo.
Junulon ĝi logas per sorĉo ĝis sin',
en oldul' ĝi iĝos ne rubo.
Se haltos en tomb' ties vivlini',
ĉe l' tombo plu plantas – esperon li.

Ne estas vanta, flata ebri',
ne frenez' de cerb', kiu restas,
enkore ĝi laŭte mesaĝas al ni:
por pli bona naskitaj ni estas.
Se tion diras ena spirit',

ne trompos l' animon konfid'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ Friedrich Schiller: „Hoffnung“

WEERTH

Ĉe l' nigra marĉo estas dom'!

Ĉe l' nigra marĉo estas dom'
Frosttremis tie vintre hom',
li frostis ne en sekva jar',
sinkinte jam sur mortuloĉar'.

Ĉe l' nigra marĉo apud dom'
frostmortis Jan, oldula hom',
je l' pord' sin turnis kun blanka mien',
li ne konsciis eĉ pri la sven'.

Li mortis. Sur l' neĝ laŭ kapreol'
la tag' eksaltas pro petol'.
„Bonan matenon, Jan! Bonan matenon, Jan!“
Jan ne salutas eĉ per man'.

Sonoriloj eksonas kun hela ton',
jen kantas kaj sonas kaj vokas el fon' :
„Bonan matenon, Jan! Bonan matenon, Jan!“
Jan ne salutas eĉ per man'.

Jen venas infanoj el la urb'.

Ne estas ili por li perturb'.

„Bonan matenon, Jan! Bonan matenon, Jan!“

Jan ne salutas eĉ per man'.

Jan estas por ĉiuj jam sen kompren'.

Jen venas la tagmeza sunoben'.

Revenas la povra in' : „He, Jan,
ne teon, ne manĝi, kara, de l' pan'?”

Mi ĉion portis por vi de l' urb'.

Varmiĝu, ĝoju, satu sen kurb'.“

La ino rigardis al sia Jan.

Ŝi ekploregis, lin tenis kun van'.

Ĉe l' nigra marĉo ploris ŝi.

Apud la marĉo mortis li.

Ŝi larmis multe ĉe ties eĝ'.

Ve-ploroj brulis sur la neĝ'.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Das ist das Haus am schwarzen Moor“ de Georg Weerth

PS: *Georg Weerth (1822-1856) estis amiko de Marks kaj Engels, li estas la unua elstara poeto-prezentanto de la germana proletaro.*

PROZPOEMAJ TRADUKOJ

Agripo de Netteshejmo

Alberti, Rafaelo

Anonimuloj

Arp, Joĉjo

Artmann, H.C

Bandeira, Manuel

Blok, Aleksandr

Breĥt, Bertolt

Federspiel, Klaus

Greßmann, Uwe

Guillén, Nicolás

Hanĉev, Veselin

Heine, Henriko

Hus, Jan

Klabund

Martinson, Harry
Matenstelo, Kristiano
Meckel, Kristofo

Nougé, Paŭlo

Rozeviĉ, Tadeo

Sahl, Hans

Törne, Folker de
Troppmann, Arturo

AGRIPO
1486-1535

Agripo

Inter la dioj estas Momus, kiu lasas neniun nemokata;
inter la herooj Herkulo, kiu persekutas ĉiujn monstrojn.

Inter la demonoj, la reĝo de la submondo
furiozanta kontraŭ ĉiuj ombroj,
inter la filozoj Demokrito ridanta pri ĉio;
kontraŭ li staras Heraklito, kiu ploras pri ĉio.

Nenion scias Pirono
kaj ĉion supozas scii Aristotelo.

Ĉion malestimas Diogeno.

Sed ĉion ĉi kapablas ankaŭ Agrippa:
malestimas, scias kaj ne scias,
ploras, ridas, furiozas, persekutas kaj mokas.

Li mem estas filozofo,
demono, heroo, dio kaj ĉio.

Hans-Georg Kaiser

laŭ „Agrippa“ de Agrippa de Nettesheim

ALBERTI

Rafael Alberti

La nekonata anĝelo

Hejmsopiro pri la arkiangĝeloj!

Mi estis...

Rigardu min.

Vestita mi estas laŭ mondkura stilo,

la flugilojn oni vidas nenie je mi.

Neniu scias kia mi estis.

Ili ne konas min.

En la stratoj – kiu ankoraŭ memoras tion?

Firmaj ŝuoj estas nun miaj sandaloj.

Anstataŭ tuniko mi vestas min per tvidjako
kaj pantalono.

Diru al mi, kiu mi estas.

Kaj tamen mi estis...

Rigardu min.

*tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser laŭ la germana
traduko Rafael Alberti: „Der unbekannte Engel“*

ANONIMULOJ

Eksterlandanoj
Malfermitaj horizontoj

Anonima

Eksterlandanoj

Via kristo estas judo

Via aŭto el Japanio

Via pico itala

Via demokratio greka

Via kafo brazila

Via forpemeso turka

Viaj ciferoj arabaj

Via skribo latina

Kaj via najbaro –

ĉu nur eksterlandano?

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ stratafiŝo en Germanio, kiu videblis en la tuta lando.

Anonima

Malfermitaj horizontoj

Mi perdis tion, kion mi sciis certe.

Mi gajnis senfinan.

Ĉe la serĉado de la alia,
de la nova, de la nekonata,
facile povas okazi,
ke oni stumblas pro si mem
kaj miras,
kia stranga estaĵo oni estas.

Kio en tiu ĉi mondo
estas ebla kaj malebla,
mi neniam scios certe.
Sekve mi rajtas
trankvile plu miri.

tradukis Hans-Georg Kaiser laŭ „Offene Horizonte“

La tekston mi trovis en broŝuro por vojaĝoj, sed la aŭtoron mi spite al detala serĉado ne trovis. (cez)

ARP

Ardi kaj flori
kaspar estas morta

Hans Arp

Ardi kaj flori

Ni volas aĉeti
rozojn.

Ni volas aĉeti
stelojn.

Kiom kostas ardanta
floranta stelo?

Kiom kostas ardi kaj flori?

Ĉu ardi kaj flori kostas la vivon?

Mia koro floras
diras la koro
Cindro cindro
respondas la malpleno.

Mia koro ardas
diras la koro
Cindro cindro
respondas la malpleno.

Ni volas aĉeti
stelojn.

Ni volas aĉeti
rozojn.
Kiom kostas ardanta
floranta stelo?
Ni demandu nian amikon,
la ŝnurdanciston,
ĉu ardi kaj flori
kostas la vivon.
Nia amiko, la ŝnurdancisto,
estas stelo unuaranga, ĉu ne?
Kiel bele, ho, kiel bele
vespere
sur sia ŝnuro li ardas
kaj floras.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Glühen und Blühen“

el „Arp Logbuch“, J.H.Arp, Ed. Arfuyen, 1983

Hans Arp
kaspar estas morta

(1948)

Ve, nia kara kaspar estas morta.

kiu kaŝu nun la brulantan flagon en la nuboharara
plektaĵo ĉiutage sonorilante nigrecan mistifikadon?

kiu turnu nun la kafmuelilon en la prabarelo?

kiu logu nun la idilian kapreolon el la ŝtonigita
papersako?

kiu konfuzu nun la ŝipojn surmare per la alparolo
parapluie kaj la ventojn per la alvoko abelpatroj,
ozonspindeloj Via Moŝto

ve ve ve, nia kara kaspar estas morta, sankta bimbamo,
kaspar estas morta.

la fojnofiŝoj klakadas pro sufero kordisŝire en la
sonorilfojnremizoj se oni parolas lian antaŭnomon. tial
mi plu ĝemante diras lian familian nomon kaspar kaspar

kaspar.

kial vi forlasis nin? en kiun figuron migris nun via bela
granda animo? ĉu vi fariĝis stelo aŭ ĉeno el
akvo je varmega kirlovento aŭ mamu el nigra lumo
aŭ travidebla tegolo je la ĝemanta tamburo de la rokeca
estaĵo?

nun elsekiĝas nia harardislimo kaj plandoj kaj la feinoj
kuŝas je duonobrulkarbigitaj sur la aŭtodafea ŝtiparo.

nun tondras post la suno la nigra keglejo kaj neniuj plu
streĉiĝas la kompasojn kaj la radojn de la ŝovataj
beboĉaretoj.

kiu manĝu nun kun la fosforeskanta rato je la soleca
nudapieda tablo?

kiu forpelu nun la sirokodiablon se li volas tenti la
ĉevalojn al seksumado.

kiu klarigu nun al ni la monogramojn en la steloj?

lia busto ornamos la kamentojn de ĉiuj vere noblaj homoj
sed tio ne estas konsolo kaj snuftabako por mortula
kranio.

tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser

laŭ „kaspar ist tot“

Antaŭ ol estis DADA jam estis DADA.(Hans Arp)

ARTMANN

H.C.Artmann

La Bionda

kiom ajn mi donus por tio
se mi nun povus ĝuplene
promeni kun vi
tra tiuj posttagmezaj herbejoj.
kaj se la vento kaptiĝus
en via brunora bukloro
kiun vi ĉiam tiel malvoleme
forviŝas de via hela frunto
kiom ajn mi donus por tio...

trad. Hans-Georg Kaiser

*laŭ germana traduko de „LA BIONDA“ de H.C. Artmann aus
„Sämtliche Gedichte“*

BANDEIRA

Manuel Bandeira

La besto

Hieraŭ mi vidis beston
en la koto de korto.
Ĝi serĉis ion por manĝi,
en forĵetitaj manĝorestoj.

Se ĝi trovis ion,
ĝi ne kontrolis ĝin,
eĉ ne flaris je ĝi.
Ĝi ĉion voris malsata.

La besto ne estis hundo,
ĝi ne estis kato
kaj ne rato.

La besto, dio mia,
estis homo.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ "Das Tier"

PS: La origino estas el la hispana lingvo.

BLOK

Libera estas la amo

Ŝia kanto

Libera estas la amo

Libera estas la amo, neretenebla birdo.

Tamen mi apartenas al vi.

Krome nenio pli volonte aperos en mia songo

ol via sovaĝeco.

Pri viaj ŝtelĝojaj fingroj

pri la okuloj, malĝojaj pro estonteca malfideleco denove

kaj denove

mi songos ĉiun horon kaj ankoraŭ vane

en febro, aĥ, Carmen.

Mi volos priskribi vin, konservi vin

al la tuta mondo.

Mi, lumigato, volos tre elokvente

rakonti al Suno pri via fajro.

Vi estos la plej danĝera ondego

en la rivero de miaj versoj.

Neniam mi forigos

per propra mano de mi

vian parfumon.

Kaj nokte, se estos kviete,
lumos por momento
kun helaj dentoj tio,
kion mi scios ĉiam: via vizaĝo.

Mi ne povos fordoni min al la espero,
ke vi pensas
en fora lando
iam pri mi.

Transe de la ŝtormoj, transe de la maltrankvila tempo,
post neevitebla malfideleco,
la penso simple ĉeestu
kaj blanku kiel strato,
kiu ireblas.

tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ la germana traduko de
Sarah Kirsch „Frei ist die Liebe“

Ŝia kanto

Tiun, kiun mi amas,
mi ne intencas enfermi per katenoj.
Li povas meti sian fidon sen duboj
en min aŭ al la vento.

Sub la kondiĉo, ke li komprenas,
ke mi amas lin.
Mi rekomendas, ke oni sentu tiel,
kvazaŭ oni vidus la stelojn.

La mano povas faligi la glavon kaj esti libera.

Oni devas majstri la senutilan tremadon,
se lavango ruliĝu en la valon.

Mi faros vin senspira kiel neĝblovado.
Niaj plezuraj voluptaj agoj
lante obtuzigu vin. La sensoj
fuĝu for de vi kiel sur balancilo.
Per tute konfuziĝinta hararo
mi ligos vin, se vi postulos tion.
Vi estos ebria kaj ĝoja

kiel post juna kamparana vino.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ germana traduko „Ihr Lied“ de Sarah Kirsch

el „versoĵ por enamiĝintoj“

BREĤT

Al la la postnaskitoj

Demandoj de leganta laboristo

Laŭdo de l' komunismo

Malfortoj

Plezuroj

Al la postnaskitoj

1

Vere, mi vivas en mornaj tempoj!

La fidoplena vorto estas malsaĝa. Glata frunto
estas signo por mankanta sentemo. La ridanto
nur ne ricevis ankoraŭ
la teruran informon.

Kiaj tempoj estas, kiam
interparolado pri arboj preskaŭ estas krimo,
ĉar ĝi inkludas silenton pri tiom da krimoj!
Ĉu tiu, kiu tie iras trankvile trans la straton, eble
ne plu atingeblas por la amikoj,
kiuj estas en mizero?

Estas vere, mi ankoraŭ perlaboras mian porvivon.
Sed kredu al mi: tio estas nur hazardo. Nenio
de tio, kion mi faras, rajtigas min manĝi ĝissate.
Hazarde ne trafis min. (Se Fortuno min forlasas,
mi pereos.)

Oni diras al mi: Manĝu kaj trinku! Ĝoju, ke vi havas.
Sed kiel mi manĝu kaj trinku,

se mi forŝiras tion, kion mi manĝas de malsatulo, kaj
se mia glaso da akvo mankas al mortanto pro soifo?
Kaj tamen mi manĝas kaj trinkas.

Volonte ankaŭ mi estus saĝa.
En la antikvaj libroj legeblas, kio estas saĝa:
Eviti la kverelon de la mondo kaj pasigi
la mallongan tempon sen timo.
Ankaŭ rezigni pri perforto,
malbonon rekompenci per bono,
siajn dezirojn ne plenumi, sed forgesi,
tio estas rigardata kiel saĝa.
Ĉion ĉi mi ne povas:
Vere, mi vivas en mornaj tempoj!

2

En la urbojn mi venis en la tempo de la malordo,
kiam regis malsato.
Inter la homojn mi venis en la tempo de ribeloj.
Kaj mi ribelis kun ili.
Tiel pasis mia tempo,
kiu surtere estis donita al mi.

Mian manĝon mi manĝis inter la bataloj.

Por dormi mi kuŝiĝis inter la murdistoj.

La amon mi flegis sen atento

kaj la naturon mi vidis sen pacienco.

Tiel pasis mia tempo,

kiu surtere estis donita al mi.

La stratoj kondukis en la marĉon en mia tempo.

La lingvo perfidis min al la buĉisto.

Mi povis ŝanĝi nur malmulton. Sed, ke la regantoj

sidus sen mi pli sekuraj, tion mi esperis.

Tiel pasis mia tempo,

kiu surtere estis donita al mi.

La fortoj estis malmultaj. La celo

troviĝis en granda foro.

Ĝi estis klare videbla, kvankam por mi mem

apenaŭ atingebla.

Tiel pasis mia tempo,

kiu surtere estis donita al mi.

Vi, kiuj vi aperos el la torento,
en kiu ni dronis,
pripensu,
kiam vi parolas pri niaj eraroj,
ankaŭ la mornan tempon,
kiujn vi jam lasis post vi.

Ĉar ni ŝanĝis pli ofte la landojn ol la botojn,
irante tra la militoj de la klasoj, malesperiĝintaj,
se tie estis nur maljusto kaj ne ribelemo.

Kaj tamen ni ja scias:

Ankaŭ la hato kontraŭ la aĉoj kaj fioj
distordas la vizaĝojn.

Ankaŭ la kolero kontraŭ la maljusto
raŭkigas la voĉojn. Ho ve, ni,
kiuj volis pretigi la teron por afableco
mem ne povis esti afablaj.

Sed vi, kiam estos tiel,
ke la homo estos helpanto por la homo,
pensu pri ni kun indulgo.

tradukis Dorotha & Hans-Georg Kaiser
laŭ „An die Nachgeborenen“ de Bertolt Brecht

Demandoj de leganta laboristo

Kiu konstruis la sepperdegan Tebon?
En la libroj troviĝas la nomoj de reĝoj.
Ĉu la reĝoj alportis la rokopecojn?
Kaj la plurfoje detruita Babilono –
kiu konstruis ĝin tiomfoje? En kiuj domoj
de la ore brilanta Limao loĝis la konstrulaboristoj?
Kien iris je la vespero, kiam la ĉina muro
estis finfarita, la masonistoj? La granda Romo
estas plena de triumfarkoj.
Kiu starigis ilin?
Super kiu triumfis la cezaroj? Ĉu la multfoje prikantita
Bizanco havis
por siaj loĝantoj nur palacojn? Eĉ en la legenda Atlantiso,
en tiu nokto,
kiam la maro voris ĝin,
la dronantoj kriegis pri siaj sklavoĵoj.
La juna Aleksandro konkeris Hindion.
Ĉu li sola?
Cezar venkis la gaŭlojn.
Ĉu li havis ne almenaŭ kuiriston kun si?
Filipo de Hispanio ploris,

kiam lia floto pereis. Ĉu krom li neniu?
Frederiko la Dua venkis en la Sepjara milito. Kiu
venkis krom li?
Sur ĉiu paĝo unu venko
Kiu kuiris la venkomanĝojn?
Ĉiun dekan jaron plua granda viro.
Kiu pagis la kostojn?

Tiom da raportoj.
Tiom da demandoj.

tradukis Dorotha & Hans-Georg Kaiser
laŭ „Fragen eines lesenden Arbeiters“ de Bertolt Brecht

Laŭdo de l' komunismo

Ĝi estas prudenta, ĉiu komprenas ĝin. Ĝi estas simpla.

Vi ja ne estas ekspluatisto, vi povas kompreni ĝin.

Ĝi estas bona por vi, informu vin pri ĝi.

La stultuloj nomas ĝin stulta, kaj la kotuloj nomas ĝin kota.

Ĝi estas kontraŭ la koto kaj kontraŭ la stulteco.

La ekspluatistoj nomas ĝin krimo.

Sed ni scias:

Ĝi estas la fino de la krimoj.

Ĝi estas ne freneza, sed

La fino de l' frenezo.

Ĝi estas ne kaoso

Sed la ordo.

Ĝi estas la simpla

Kiu malsimple fareblas.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Lob des Kommunismus“ de Bertolt Brecht

Malfortoj

Vi havis neniun,
mi havis tiun:
mi amis.

*tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Schwächen“ de Bertolt Brecht*

Plezuroj

La unua rigardo el la fenestro matene

La retrovita malnova libro

Entuziasmaj vizaĝoj

Neĝo, la ŝanĝo de la sezonoj

La gazeto

La hundo

La dialektiko

Duŝado, naĝado

Malnova muziko

Oportunaj ŝuoj

Ekkompreno

Nova muziko

Verkado, plantado.

Vojaĝado.

Kantado

Esti afabla.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Vergnügungen“ (1954) de Bertolt Brecht

FEDERSPIEL

Jürg Federspiel

Paracelso

por Margarita

Nenio estas venena. Ĉio estas venena. Dependas de la dozo, diras Paracelso, la majstro.

Nenio estas stulta kaj nenio tute prudenta:

Dependas de la tempo, kiam io estas plenumita aŭ delikto je certa tempo.

Temas nur pri la demando, kiu buroo ĝuste prijuĝas tion.

Nenio estas dia. Nenio estas nur diabla:

Temas ĉiam pri la demando en kiu kuirejo la anĝeloj de la fajrobrigado estas dungitaj kaj de kiu.

La morto ne estas gaja. La morto ne estas malgaja.

Temas nur pri la demando, kiu postrestas, kiu foriras.

Neniu pomo putras, neniu piro kaj pruno:

Ankaŭ abeloj ŝatas sian vivon, la mallongan.

Neniu amo estas reala kaj ankaŭ ne la malamo, se la malamanto vendas la amon

kaj la amanto forgesis malamatan: Neniun tagon
oni vivas tro longe, ankaŭ ne horon tro mallonge.
Dependas de la noktoj, amato, amatino:
La brilo de kandelo estas tiom longa, kiom la meĉo,
kiu estingiĝas kaj sufokiĝas en la vaksa korpo.

Nenio estas mortiga. Estas ĉio vivanta,
ekkonis la majstro, kiam la nokto leviĝis en li.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Paralcelsus“

PS: *La poemo estas enirpoemo al la reportera volumo de la verkisto: „Malica, frenezo kaj rubo“*

GRESSMANN

Uwe Greßmann

Invito

Jen eliras invitoj;
laŭ alparola maniero
ili malfermas la buŝon
kaj diras,
ke la tagordo sekvas

Jen la temo:

aero, lumo, Tero, ĉielo, Suno...

Ilia migrado en la spacoj de l' kosmo,
en la senfina domo, kiel oni opinias.

Kaj tiu, kiu krome kunsidas tiutempe,
lasu lumi sian ampolan „piran kapon“ super la tablo;
kaj aŭskultu.

Parolas ja

en himna tono

kaj festas, la naturo,

kiu tie estas spirito kaj mondo kaj volo

kaj tamen perdus la sencon,

se oni nur simple rigardus ĝin
sen pensi ion pri tio,
ke tio estas arbo, ĉevalo,
kaj ke tio ĉi estas herbotigo;
Ja, ke io tia efektive ankoraŭ ekzistas
spite al la kamentuboj,
kiuj fumas en la urbo.

Kaj tio eliras kun la invitoj,
alparoli onin pri tio
kaj demandi: Ĉu vi konas la naturon,
kiu estas fremdaĵo inter multaj?

*tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser
laŭ „Einladung“*

GUILLÉN

Nicolás Guillén

Akvo de l' rememoro

Kiam tio estis?

Mi ne scias.

Sur la akvo de l' rememoro

mi volas veturi.

Mulatino el oro preterpasis;

mi rigardis ŝin, vidis ŝian mirindan

silkan nodon de la hararo en la nuko,

la matenrobon el kristaloj,

knabino kun juna dorso,

la sablon, kie estis la freŝaj spuroj de ŝiaj piedoj.

Sukerkano mi nomis ŝin, interne konsternite).

Sukerkano tremanta super la abismo,

kiu puŝos vin en la fridgetan abismon?

Kiu falĉos vin per sia maĉeto,

kiu do, kiu falĉisto?

Kiu sukerfabriko pulvorigos vin

per sia sukermuelilo?

Tiam la tempo forkuris de mi,
forkuris la tempo sen halto,
kaj tie mi estis, kaj tie ĉi mi estis,
m iris tien kaj ĉi tien,
al ĉi tie kaj tie.

Nenion mi eksciis, neniŭ scias ion,
kaj neniam iu scios ion,
nenion la gazetoj konfidis al mi,
nenion mi povis ekscii pri tiu mulatino el oro,
kiun mi vidis iam, kiam ŝi estis preterpasanta
kun sia surnuka mirinda nodo
de la hararo el silko;
kun la matenrobo el kristaloj,
knabino kun juna dorso;
kies freŝaj piedospuroj estis en la sablo.

tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ germana versio de Erich Arendt
el la libro „Versoj por enamiĝintoj“

HANĈEV

Veselin Hanĉev

Gulivero

Mi estas Gulivero
en la lando de viaj malgrandaj manoj.

Kun dek malgrandaj blindaj liliputanoj
vi akceptas min, amatino!

Kun dek malgrandaj blindaj liliputanoj
vi ĉirkaŭbrakas min, amatino.

Kun dek malgrandaj blindaj liliputanoj
vi gvidas min,
vi lulas min,
vi enkatenigas min
per dikaj ŝnuroj el hararo.

Dek malgrandaj liliputanoj
kuras super trans min
kaj mian koron,
li penetras en miajn sekretojn,
kaj el la steloj en miaj okuloj

ili faras gajajn etajn lanternojn.

Karaj nanoj!

Malbenitaj nanoj!

Sed mi estas pli blinda ol ili,

Sed mi estas pli malgranda ol ili.

Mi ne plu povas leviĝi.

Mi forgesas,

ke mi devas serĉi la landojn de l' gigantoj.

Mi estas Gulivero

en la lando de viaj malgrandaj manoj,

amatino...

laŭ germana traduko

de Irene Duplewa

tradukis Hans-Georg Kaiser

HEINE

Demandoj

Himno

Demandoj

Ĉe l' maro, ĉe l' trista nokta maro
Staras junulo-viro,
Kun veplena brust', kun duboplenta kapo,
Kaj kun mornaj lipoj demandas la ondojn:

„Ho solvu l' enigmon de l' vivo,
La praan turmentantan enigmon,
Pri kiu cerbumis jam kelkaj kapoj,
Kapo hieroglifĉapelaj,
Kapo kun turban' aŭ nigra biret',
Perukokapo kaj miloj da pliaj
Povraj ŝvitantaj homokapo –
Diru do, kio estas la hom'?
De kie la hom' venis, kien iros?
Kiu loĝas tie sur orobrilaj steloj?“

Murmuras la ondoj sian eternan murmuron,
Vent' blovas, flugas la nuboj,
Brietas la steloj indiferece kaj fride,
Kaj stultul' atendas respondon.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laũ „Fragen“

Himno

el la postlasaĵo de l' verkisto

Jen mi la glav', jen mi la flamo.

Mi eklumigis vin en la tenebra temp' kaj ĉe l'

batalkomenc' kunskermis mi, en la vic' unua.

Kuŝas ĉirkaŭ mi la mortaj amikoj miaj, sed tamen venkis

ni. Dum la jubilaj triumfokantoj sonas en la mortintfest'

ĥoraloj. Sed havas tempon ni nek por ĝojo nek funebro.

Denove eksonas trumpetoj, denovas batal'.

Jen mi la glav', jen mi la flamo.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Ich bin das Schwert, ich bin die Flamme“

HUS

Jan Hus Vero

Tial, kara kristano,
serĉu la veron,
aŭskultu la veron,
lernu la veron,
amu la veron,
parolu la veron
firmtenu la veron,
defendu la veron
ĝis la morto,
ĉar ĝi liberigos vin
de la peko,
de la diablo,
de la morto de l' animo
kaj finfine de la eterna morto.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ la ĉeĥa originalo „Pravda“:

Rimarko

*La teksto de Jan Hus taŭgas por ĉiu, ankaŭ por nekristanoj.
Eble eĉ pli por nekredanoj. Mi metis la tekston por vi en
prozpoeman formon kaj donis al ĝi la supran titolon. (cez)*

KLABUND

Klabund

La amo en songô

Lasta kiso tuŝas ŝiajn okulharojn, kaj
lacigite de la volupto, ŝi fermas la belajn,
la lacajn okulojn, spiras profunde - kaj ekdormas.
Jam leviĝas facile la mamoo,
kliniĝas softe
renkonte al la songô,
tiel kiel Luno al maro,
kiel ondo apogas sin al ondo.
Kaj falas kaj leviĝas.
Mi apenaŭ moviĝas, por ke mi ne veku ŝin.
Sed kiam ŝia mallaŭta spiro
trafas min kiel papavaodoro,
mi estas elektrizita de la silenta brilo
de la membroj,
ekflamigita.
Mi kliniĝas al ŝi kaj amoras delikate
la dormulinon, kiu nur unufoje en la songô

kiel kolombo
dormeme kveras
kaj ĝemas.-
Ŝi eble
sonĝas,
ke mi amoras ŝin.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Die Liebe im Traum“

MARTINSON

Harry Martinson Anjo

Anjo, brilokulo.

Ĉu vi ankoraŭ memoras pri tio? Ni estis tiam sepjaraj.

Ni kaŝis nin en la sekalokampo,

sur granda ŝtono, nomata „monteto de l' gigantoj“.

Ĉirkaŭ ni flavis la torento de l' sekalo.

Ĉirkaŭ ni estis la flava golfo de l' sekalo,

kiu ĉirkaŭbrakis la lange longan duoninsulon de l' abia
arbaro.

Anjo, ĉu vi ankoraŭ memoras pri la ruĝa buo de l' kabano
sur la kabo Horn de l' arbaroj?

Ĉirkaŭ nia soleca insulo kaŝe flustris la spikoj,

mi kisis vian buŝon,

bluaj kampomusoj preternaĝis kiel la balenoj tie ekstere
meze de la maro.

La suno kaj la akridoj estis la delfenoj de la spikoj.

Kiel peza kesteca pramo nia eduka patrino proksimiĝis al ni.

Ŝi pilotis nin hejmen en la havenon de la kabano.

Sekvis batoj kun la avelbastono kaj krioj kiel S.O.S.-signaloj.

Ĉu vi ankoraŭ memoras tion, Anjo?

tradukis Hans-Georg & Dorothea Kaiser laŭ la germana traduko de Bernd Jentsch

PS: *buo = surloke drivanta danĝersignalilo, fiksita funde en maro, lago aŭ rivero*

pramo = barĝo = ŝarĝboat(et)o

MATENSTELO

Al la nuboj

Tio ja tute ne ekzistas!

Al la nuboj

Kaj ĉiam denove,
se mi rigardis ĝis laciĝo
sur homajn vizaĝojn,
al tiom da speguloj
de nedirebla stulteco,
mi levis la okulojn
trans la domojn kaj arbojn
supren al vi,
al vi, eternaj pensoj de l' ĉielo.
Via granda kaj libero
savis min ĉiam denove
kaj mi pensis mi kun vi
trans landojn kaj marojn
kaj pendis kun vi
super la abismo de l' senficeo
kaj disiĝis laste
kiel nebulo,
kiam mi vidis flugi
la nemezureblan semon
de la steloj
trans la agrojn

de neesploreblaj profundoj.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ: „An die Wolken“ de Christian Morgenstern

el: „Mi kaj la Mondo.“ Ĉiuj verkoj, volumo 3

Tio ja tute ne ekzistas!

La bovopasero
La kamelanaso
La pluvoleono
La kolobumbombeno
La sinostrigo
La balenbirdo
La meduzocimo
La zonotaŭro
La pavobovo
La lupfantomvulpo
La tagtingalo
La segocigno
La dolĉakvomopso
La vinpinŝero
La ŝtormludo
La strigovermo
La ĝirafoerinaco
La rinoceroponeo
La anseroŝmalcfloro
La hombaobabo.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laũ „Das gibt's doch gar nicht!“ de Christian Morgenstern

MECKEL

Tempo

Parolo pri la poemo

Parolo pri la poemo

La poemo ne estas la loko, kie la beleco estas flegata.
Ĉie tie estas la parolo pri la salo, kiu brulas en la vundoj.
Ĉi tie estas la parolo pri la morto, pri venenigitaj lingvoj.
Pri patrolandoj, kiuj samas al feraj ŝuoj.
La poemo ne estas la loko, kie la vero estas ornamata.
Ĉi tie estas la parolo pri la sango, kiu fluas el la vundoj.
Pri la mizero, la mizero, la mizero de l' revo.
Pri dezertigo kaj ekskremento, pri kadukaj utopioj.
La poemo ne estas la loko, kie la doloro estas sanktigata.
Ĉi tie estas la parolo pri kolero kaj trompo kaj malsato.
(la fazoj de l' satiĝo ĉi tie ne estas prikantataj).
Ĉi tie estas la parolo pri tio kiel vori kaj esti vorata,
pri peno kaj dubo, ĉi tie estas la kroniko pri la suferoj.
La poemo ne estas la loko, kie la mortado trankviligas
iun,
kie oni kontentigas la malsaton, kie oni faras dion el la
espero.
La poemo estas la loko de la ĝismorte vundata vero.
Flugiloj! Flugiloj! La anĝelo falegas, la plumoj
ŝvebas unuope kaj sangomakulitaj en la ŝtormo de l'
historio!

La poemo ne estas la loko, kie la anĝelo estas indulgata.

Tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Rede vom Gedicht“

Tempo

Post la tempo de la pano venos la tempo de la akvo.

Tiu, kiu manĝis panon, nun povas trinki akvon.

Kaj tiu, kiu ne havis panon,

povas drinki tiom da akvo, kiom li volas.

Tiam finiĝos la tempo de la akvo.

Akvo kaj pano ne plu kunvenos

kaj estos la parolo pri la tablo, kiu unuigis la panon kaj la akvon.

Tiam la tablo estos legendo.

Neniu tablo, neniu parolo pri la tablo en la tempo de la seĝo.

Post la tempo de la seĝo venos la tempo de la planko.

Tiu, kiu sidis sur seĝo,

nun povas stari kaj iri kaj kuŝi surplanke

kaj tiu, kiu ne havis seĝon,

povas sidi sur la planko tiom longe, kiom plaĉas tiun.

Tiam la tempo de la planko finiĝos.

Planko kaj seĝo ne plu kunvenos

kaj estos la parolo pri la ĉambro, kiu unuigis la tablon kaj la seĝon.

Poste la ĉambro estos legendo.

Neniu ĉambro, neniu parolo pri la ĉambro en tempo kaj spaco.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Zeit“

NOUGÉ

Paŭlo Nougé

Ĉeesto

La ĝardeno apogas sin kontraŭ la fenestro per sia odoranta abundo.

La nokto venas delikate por apogi sin al la ĝardeno.

Manĝo (ŝi sidas ĉe la fenestro) malfermas iom sian robon, ŝiaj ŝultroj nudiĝas.

Ŝi atendas ĉe la turnokurbiĝo de l' nokto.

Ŝi atendas. Ŝi movas fingron lante

laŭ siaj lipoj. Ŝiaj fingroj sur ŝiaj

lipoj faras la silentosignon.

Ŝi atendas. Ŝi tuŝe movas siajn fingrojn

laŭ la hararo, trans la brakojn nudajn.

Ŝi tenas la okulojn malfermitaj al la koro de l' nokto.

Kaj cedante la ĝardeno retiriĝas nerimarkeble,

forlasas la fenestron, tiel, kiel la nokto

tenere disiĝas de la ĝardeno.

Iom da matena ruĝo kolorigas ja la muron,

la fenestron, la tutan inon, kiu apogas sin

sur la mateno.

trad. Hans-Georg Kaiser

laŭ „Anwesenheit“ de Paul Nougé

RÓZEWICZ

Tadeusz Różewicz

Rakonto pri oldulinoj

Mi amas la oldulinojn
la malbelajn inojn
la malicajn inojn

ili estas la salo de l' tero

ili ne abomenas
la falintajn homojn

ili scias la alian flankon
de l' medalo
de l' amo
de l' kredo

ili venas kaj foriras
la diktatoroj petolas kiel pajacoj
ili havas kotajn manojn
(de la sango de homestaĵoj)

la oldulinoj matene leviĝas
aĉetas viandon fruktojn panon
purigas ion, kuiras ion
staras sur la strato kun interligitaj
manoj, silentas

la oldulinoj
estas senmortemaj

Hamleto furiozas en reto
Faŭsto ludas fian kaj ridindan rolon
Raskolnikov ekbatas per hakilo

La oldulinoj estas
nedettrueblaj
ili ridetas pardoneme

Dio mortas
sed la oldulinoj vekiĝas kiel ĉiutage
aĉetas je la frua mateno panon vinon fiŝon
la civilizacio mortas
la oldulinoj matene leviĝas
malfermas la fenestrojn

forigas la koton
homo mortas
la oldulinoj lavas la mortulon
gardas la mortulojn
plantas florojn
sur la tomboj

mi amas la oldulinojn
la malbelajn inojn
la malicajn inojn

ili kredas pri la eterna vivo
ili estas la salo de l' tero
la ŝelo de l' arbo
la humilaj okuloj de l' bestoj

Malkuraĝon kaj heroecon
Grandon kaj fiecon
ili vidas laŭ la veraj mezuroj
kiuj estas proksimaj al la postuloj
de la ĉiutaga vivo.

Iliaj filoj malkovras Amerikon
kiel soldatoj donas la vivon ĉe la Termopiloj
mortas je l' kruco
konkeras la kosmon

la oldulinoj matene iras en la urbon
aĉetas lakton panon viandon
kuiras la supon
malfermas la fenestrojn

nur stultuloj ridas
pri la oldulinoj
la malbelaj inoj
la malicaj inoj

ili estas ja belaj inoj
bonaj inoj
tiuj oldulinoj
ĉiu el ili estas ovo
sekreto sen sekreto
ruliĝanta kuglo

la oldulinoj
estas mumioj
de sanktaj katoj
ili estas malaltaj
sulkigitaj
elsekiĝintaj
fontoj aŭ fruktoj
aŭ grasaj
ovalaj Budhaoj

kiam ili mortas
fluas el unu
el iliaj okuloj
ploro
kaj unuiĝas
sur la buŝo kun rideto
de knabino

tradukis Hans-Georg Kaiser

*laŭ la germana traduko „Erzählung über die Alten“
de Karl Dedecius*

SAHL

Hans Sahl

La lastaj

Ni estas la lastaj.

Eldemandu nin.

Ni estas kompetentaj.

Ni portas la notfolian keston

kun la persekutleteroj de niaj amikoj antaŭ ni,
tiel, kiel kolportisto sian vendokeston.

Esplorinstitutoj aspiras pri

la tolaĵkalkuloj de perdiĝintoj.

Muzeoj konservas la kapvortojn de nia agonio
kiel relikvoj sub glaso.

Ni, kiuj disipis nian tempon,

pro kompreneblaj kaŭzoj,

fariĝis la brokantistoj de la nekomprenebla.

Niaj sortoj estas protektataj kiel monumentoj.

Nia plej bona kliento estas

la malbona konscienco de la postmondo.

Prenu do, priservu vin.

Ni estas la lastaj.

Eldemandu nin.
Ni estas kompetentaj.

tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ "Die Letzten"

Rimarko

Hans Sahl mortis post longa ekzilo en Usono, naŭdekjara en Germanio. Kiam li revenis en 1987 li verkis tiun poemon.

TÖRNE

Volker de Törne

Matena dono

Ĉio por vi

La suno

La maro

La tago

kaj la nokto

La vito

La vinberoj

La mevoj

En la vento

De la ĉielo

Alterniĝantaj

koloroj

La olearbo

La tero

La roko

La akvo

En la puto

La pano
Kaj la salo
La odoro
De la citronoj
Ĉio por vi
Ĉio por vi

tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser
laŭ „Morgengabe“

TROPPMANN

Humaneco

Junulamo

Laborista verkisto

La senhejmuloj

Nekonstruadejo

(Re) privatigo

Surkrucigo

Humaneco

Humaneco estas
se herboj kreskas
super la armilojn
kaj la najbaro
povas dormi
sen timo.

Se ni
planas la feliĉon
kaj la postulo
pri feliĉe pasigita vivo
estas atingebla
por ĉiu.

*tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ "Humanität"*

Junulamo

En la fotoalbumo
mi konservas vin
kun via dimanĉa robo.
Vi tie ĉiam junas
kaj ĉiam ridetas.
La kaŝtanoj apogas
niajn biciklojn.
Sur la herbejo kaŭras via kato.
Sur la horloĝo de la preĝejo
estas ankoraŭ la dektria.
Ĝuste antaŭ la komenco de l' memfotado
ensomere de la jaro 1938
ni ankoraŭ rigardis
pro tropetolemo
sunen
ĝis ni preskaŭ blindiĝis
pro lumo
kaj varmo.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Jugendliebe“

el la poemaro „Ĉielo kaj vitro“

Laborista verkisto

Senlaborulo mi estas
au ŝupurigisto
en la plej granda urbo de l' mondo.
Mi kaŭras antaŭ vi kiel almozetanto
kun lambastonoj kaj
akvecaj okuloj.

La trolababoraĉulo mi estas
sub la senkompata montrofigro
de l' kontrolhorloĝo.

La papilio mi estas
super viaj geranioj
aŭ malsana arbo,
kiu skribas per senfoliaj branĉoj
en la kvieton.

La kamarado mi estas,
kiu batalas kun vi.

tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Arbeiterschriftsteller“

La senhejmuloj

Kia bildo!

Ambaŭ kuŝis sur la herbejo
sub la tilio.

Cignoj en la kanalo,
majestaj kaj kun longaj koloj.
Printempaj floroj en la bedoj
kaj la flava aleo de arbustoj.

Kia bildo!

Nuboŝtuparoj en la ĉielo
kaj la du bunte vestitaj mortintoj,
ĉirkaŭbrakiĝis.

Ĝenis nur la aŭtomobilo por mortintoj
tiun junan verdaĵon.

„Ili jam hieraŭ kuŝis ĉi tie“,
diris la nutranto de sciuroj
kaj demetis siajn nuksojn.

*tradukis Hans-Georg Kaiser
laŭ „Die Obdachlosen“*

Nekonstruadejo

En la nekonstruadejo,
pri kiu ankoraŭ ŝakras
la makleristoj,
estas la eta paradizo
por infanoj –
kie sambukaj arbustoj,
urtikoj, leontodonoj
kaj la rustanta aŭtoradkovrilo,
per kiu ili vojaĝas
en la ĉielon.

En la praarbaro de la herboj
krablas junioskaraboj
kaj orelovermoj,
ili kaŝiĝas sub
sepmejlaj botoj.

En malnova kofro
ĉio havas lokon,
kion bezonas
infanoj
por vojaĝo:
la spegulpeceto,

kelkaj ŝtonoj,
la ligna vesto
kaj bukedo da lekantetoj.
Tiam la vojaĝo ekas;
laŭ papilio,
kiu montras la vojon
al kunpremita
birdodometo.

tradukis Dorothea & Hans-Georg Kaiser
laŭ „Baulücke“

(Re)privatigo

Ĉio devas esti

(re)privatigita:

La ruboforigado

la tv-elsendejoj

la poŝto

la fervojo

la polico

la armeo

la dogano

la registaro

kaj fine

ankaŭ la homo.

Jes ja,

ni volas denove esti

servutuloj.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laŭ „Re-Privatisierung“

Surkrucigo

Sub la vitrotabula ĉielo
de la fabrihalo,
kiam la laborpelistoj
martelas al ni
la akordon
en la kraniojn,
kiam manoj
kaj piedoj
estas ŝraŭbitaj
al la maŝino,
kiam brulas buŝo kaj okuloj
kaj horo
estas eterneco,
kiam la tempkontrolistoj
mortpikas nin
per horloĝmontriloj -
jen ĝi estas plenumata:
la surkrucigo
por la mastro,
kiu sunbanas sin
en sia vilao

ête la maro.

tradukis Hans-Georg Kaiser

laũ „Kreuzigung“

Redaktofino

28.11.2016

La kolekto tute ne estas kompleta, kaj tial mi ĉiusemajne enmetas novajn tekstojn. (Cezar)